

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
96-a jaro • n-ro 1155 (1) • **Januaro 2003**

Novjara mesaĝo de la prezidanto: 2002 estis bona jaro!



**Bibliotekoj:
Fajfszi-kolekto**

**Lingva egaleco:
rajto de eŭropanoj**

**Interreta ŝanco
de Esperanto**

Esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org, marcek@esperanto.sk

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32;
USD 30; JPY 3300 ktp); informiĝu ĉe
via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p.
90. Movada rabato 50%. Anoncoj
sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964 kaj
SWIFT code: PSTBNL21).
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599 kaj
SWIFT code: ABNANL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ☎ +31-10-436-
1751, ✉ uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.

Vi trovos...



ke tiu ĉi numero venis al vi – el Slovakio! Espereble sen
problemoj kaj malfruoj: temas ja pri eksperimento por ŝpari tempon kaj monon.
Forpasis unu jaro de la momento, kiam mi la unuan fojon, iom timeme kaj
scivoleme, frapis vian pordon. Intertempe mi havis la okazon plurajn el vi
renkonti persone, ekzemple dum la Universala Kongreso en Brazilo, aŭ dum
la novembro Malferma Tago en Roterdamo, kaj paroli kun vi pri la aspekto
kaj enhavo de nia revuo. Kaj jen ni ĉiuj staras antaŭ plua pordo – sur la sojlo
de la jaro 2003. Mi sincere deziras al vi, ke ĝi estu bona kaj sukcesa.

Enhavo

- 3 La ĵus finiĝinta jaro estis bona jaro por la movado
(novjara mesaĝo de la prezidanto Renato Corsetti).
- 4 Landaj Asocioj – la kolonoj de UEA (Michela Lipari).
- 6 Efektiva lingva egaleco: rajto de la eŭropanoj (Humphrey Tonkin).
- 8 Bibliotekoj: Fajski-kolekto en ŝtata prizorgo (István Ertl, patro kaj filo).
- 9 Informoj el Bruselo (Dafydd ap Fergus).
- 10 Litovaj instancoj tre serioze traktas Esperanton (Renato Corsetti/Stano Marček).
- 11 Interreta ŝanco de Esperanto (Luis Guillermo Restrepo Rivas).
- 12 Novembro Malferma Oficejo en Roterdamo (Ziko Marcus Sikosek).
- 13 El la poŝtkesto: István Ertl, Sergio Otto Vaske, Germain Pirlot, Āke Ahlén.
- 14 Recenzoj: Paul Gubbins pri *Rakontoj ne nur ŝercaj* de Vladimír Váňa.
Lariko Golden pri *Dis!* de Sten Johansson.
- 15 Valentin Melnikov pri *La Bluoj* de Vesna Parun.
Jennifer Bishop pri *Gloso Blago*.
- 16 Forumo: Afrika Agado en danĝero (Agnes Geelen).
- 17 Laste Aperis.
- 18 Loke, Fake, Persone.
- 19 Forumo: La 15-a ĉenero (David Shamgar). Oficiala Informilo.
- 20 Tra la mondo: La Kataluna sur Majorko (Llibert Puig). Interlingvistiko
populariĝas (Ilona Koutny).
- 21 La Benina ĉefurbo de Esperanto (Gbeglo Koffi). Rendevuo de praktikantoj
(Andrzej Sochacki). Rusa E-librejo (Viktoro Kandalinskij).
- 22 La kampanjo Membro-Membron! Krucenigma konkurso (Stano Marček).

FRONTPAĜE: Fotomazaika retrorigardo al la jaro 2002: la 37-a Universala Kongreso
de Esperanto en Fortalezo (Stano Marček), la 58-a Internacia Junulara Kongreso
en Pato Branco (fotoj de Chuck Smith), Ago-Tago en Brazilo (Paulo Cavelho), E-
kursoj en Pakistano (Amjad Butt).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, Unesko): d-ro Renato
Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio;
☎ +39-06-957-57-13; ☎ +39-06-957-66-33; ✉
renato@esperanto.org.

**Vicprezidanto (strategia kaj planado, esploro kaj
dokumentado, UN Novjorko):** prof. Humphrey
Tonkin, 279 Ridgeway Road, West Hartford, CT 06107
Usono; ☎ +1-860-561-26-69 [h]; ☎ +1-860-561-52-
19 [h]; ☎ +1-860-768-44-48 [of]; ☎ +1-860-768-44-
11 [of]; ✉ tonkin@mail.hartford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-
Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong,
Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎ +82-53-765-0880 [h];
+82-53-652-4488 [of]; ☎ +82-53-652-8141 [of]; +82-
53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun
TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj,
Nobel-kampanjo):** s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25,
HR-21000 Split, Kroatio; ☎ +385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; ☎ +385-(0)21-393-597 [of];
✉ osibov@provst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen,
Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlan-
do; ☎ +31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@
esperanto.org.

**Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika
agado:** s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe,
Lomé, Togolando; ☎ +228-227-21-17; ✉ esp.togo@
cafe.tg.

Informado: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-
14, RU-429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio;
☎ +7/83536/59856; ✉ andreo@mail.ru.com.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare
223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98;
☎ +39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.
org.

Observanto de TEJO: s-ro Marko Naoki Lins.

Observanto de ILEI: s-ro Mauro la Torre.

Novjara mesaĝo de la prezidanto

La ĵus finiĝinta jaro estis bona jaro por la movado

Renato Corsetti

Karaj esperantistoj,

malgraŭ tio, ke tradiciaj funkcioj de movadaj organizaĵoj kiel
mi emas koncentriĝi je la malfortaj flankoj de nia situacio
(membronombro, abonoj je paperaj revuoj, ktp.) oni ne povas
ne rimarki ke daŭris en la jaro 2002-a la pliiĝo de la nombroj de
retaj komencantoj. Ne eblas citi difinitajn retajn kursojn en
difinitaj landoj, sed fakte ĉiuj tiaj kursoj havas centojn aŭ milojn
da novaj lernantoj. Mi humile konfesas, ke, kiam mi aranĝas
tradician ĉeestantan kurson, mi havas problemojn atingi dekon da
partoprenantoj, kaj tial mia admiro al la produktantoj kaj
funkciigantoj de la retaj kursoj estas tre granda. Oni certe ne
rajtas diri kaj rediri la konatan frazon: *La moderna junularo
pensas nur pri dancado kaj amuziĝado kaj ne pretas lerni novajn
aferojn.* Necesas nur, proponi ilin en la ĝusta maniero.

La kresko de intereso kaj entuziasmo pri Esperanto kaj ĝiaj
idealoj ekster Eŭropo daŭris. La partoprenantoj de la Universala
Kongreso povis propraspekte rimarki kia povas esti Esperanto-
movado en Suda Ameriko: juna, brua kaj idealisma. Mi aldonu
por vi etan informon laŭ la sama linio: en Afriko oni lanĉis kursojn
por aparte varbi pli maljunajn homojn kaj eliri el la 'pesto' de la
troa juneco de la movado. En Azio, dum la jaro 2002-a, oni
eksperimentis Esperanto-kongreson en mongola tendego, kaj
vidis, ke ĝi funkcias.

Estas ankaŭ malgrandaj okazaĵoj, kiuj donis al mi la klaran
senton, ke Esperanto havas tian forton, ke ĝi sukcesas superi la
plej fortajn mondajn problemojn. Vi ĉiuj legis siatempe pri la
heraĵoj de esperantistoj de antaŭaj generacioj en militaj
situacioj. Nun aŭskultu ĉi tion: islama esperantisto decidis
pilgrimi al Mekko, Saŭda Arabujo. Temas pri la konata rita
pilgrimo, kiun ĉiu pia islamano faras almenaŭ unu fojon dum
la vivo. Tiu esperantisto kaŝas libron pri Esperanto en kelkaj
lingvoj en sian valizon, kaj li riskas tre drastajn sekvojn, se oni
eventuale malkovros ilin, por la malpermeso pri politika kaj
alispeca propagando dum la pilgrimado mem. Feliĉe li
sukcesas trairi senprobleme la kontrolojn, kaj poste dum la tuta
periodo riskas ankoraŭ eksterproportie grandajn punojn, ĉar
dum la tagaj paŭzoj li arigas kunpilgrimantojn kaj instruetas al
ili pri kaj en Esperanto. Laŭ la sama pensolinio mi rimarkis kun
miro kaj ĝojo la interŝanĝon de bondeziroj inter pakistanaj kaj
barataj (hindujaj, se vi preferas) esperantistoj okaze de festo.
Kiel vi scias Pakistano kaj Barato estas inter la landoj, kiuj plej
malbone termentas nuntempe.

Ĉiukaze por malpravigi tiujn, kiuj daŭre diras al mi: *Viaj
mesaĝoj estas longaj kaj senkonkludaj*, mi venu nun al kelkaj
pli konkretaj aferoj. Dum la pasinta jaro komencis funkcii la tiel
nomata Komunikaĵ-Centro en Bruselo (pli malfacilan nomon ni
apenaŭ estus povintaj elpensi) de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu
havas la subtenon de UEA. En tiu Centro ĉefe laboras Dafydd Ap
Fergus (oni sisteme kaŝas de mi la elparolon de kimraj nomoj,
por ke mi ne skribu ilin en komprenebla formo).

Ĉu vi kredus, ke en kelkaj monatoj da laboro, baziĝante sur la
ideo: *la Esperanto-movado batalas kontraŭ lingvaj diskriminacioj*,
tial ni estas parolantoj de Esperanto, la Centro atingis sukcesojn,
kiujn neniu el ni esperis, kiam ĝi estis starigita? Krom dekoj da
artikoloj kaj informoj en pluraj ĵurnaloj, ĝi devigis la Eŭropan
Komisionon (temas pri tiuj ĝesinoroj en Bruselo, kiuj daŭre
aperas en la televido, kaj kies mesaĝoj estas pli longaj kaj pli
tedaj ol la miaj) agnoski, ke ĝi diskriminacias, kiam ĝi anoncas
postenojn en Bruselo, al kiuj rajtas proponi sin nur denaskaj
anglalingvanoj. Kompreneble tio estas nur la komenco de la
batalo. Nun la Komisiono postulas nur kvazaŭdenaskajn konojn,
ktp.

La Centro kaj EEU nun antaŭeniras al novaj bataloj kaj al novaj
formoj de informado pri tio, ke lingva diskriminacio estas
maljustaĵo. Ili komencas, danke al donacoj de malavaraĵ
esperantistoj, aperigi anoncojn en gazetoj por rekte alparoli la
koncernatajn politikistojn kaj la publikon. Mi estas tute
konvinkita, ke tiu strategio de kunligado de Esperanto al
konkretaj mondaj problemoj estas tio, kio donas al ni la rajton
ekzisti kaj donas al la neesperantistoj la kialon por respekti nian
laboron.

Mi havas tamen en la nuna momento du grandajn dolorojn,
kaj kiam mi diras "mi", mi fakte volas diri "ni", la Esperanto-
movado.

Ni devas sukcese relanĉi la plijuniĝon de la movado ankaŭ en
Eŭropo, ĉar pro la monda ekonomia situacio la riĉaj landoj
kompreneble havas gravan signifon en nia laboro. Ni estas en
ĉi tiu stranga situacio, en kiu multaj junaj
homoj lernas Esperanton per la reto, sed
apenaŭ iuj el ili iĝas aktivaj kaj organizataj
movadanoj. Ni devas trovi la manieron
alparoli ilin en formoj kompreneblaj por ili
pri la neceso pli konkrete subteni la
movadon pro ĝiaj potencie mondo-
transforma rolo.

Ni devas sukcese relanĉi la organi-
zitan instruan agadon, la agadon de
la Internacia Ligo de Esperantistaj
Instruistoj. Kiel mi ofte diras Serce
(kaj oni eĉ riproĉas tion al mi: *La
prezidanto de serioza organizo
ne ŝercas.*) – la Esperanto-
instruantoj estas la mankanta
ĉenero inter homoj kaj esperantistoj.

Laboro pri tiuj du punktoj kaj pri
amaso da aliaj punktoj atendas nin
ĉiujn dum la jaro 2003-a, sed ni certe
ne devas timi tiun laboron, precipe
kiam ni rigardas la bonajn rezultojn
de nia pasintjara laboro.

Bonan novan 2003-an jaron al ĉiuj!



Landaj Asocioj – la kolonoj de UEA

Universala Esperanto-Asocio konsistas el Individuaj Membroj, kiuj rekte pagas sian kotizon, kaj kolektivaj membroj de Landaj kaj Fakaj Asocioj. En tiu ĉi rubriko ni prezentas al vi la Landajn Asociojn.

Ĉina Esperanto-Ligo

La retadreso: cel@china-report.com. La hejmpaĝo: www.espero.com.cn. La sidejo: senpage disponigata de la ŝtato. Ekzistas biblioteko kun ĉirkaŭ 8 000 libroj kaj libroservo. Aperas la bulteno *La Mondo* – dumonata kun 28 paĝoj. La membroj estas ĉirkaŭ 1 000 – individuaj. Estas 29 provincaj kaj 5 fakaj asocioj, la estraro estas 7-persona. La landa kongreso okazas ĉiun kvaran jaron kaj daŭras 3 tagojn. La komitatanoj ĉe UEA: Tan Xiuzhu, Yu Tao, la ĉefdelegito: Yu Tao. Ekzistas perkoresponda kurso. La ĉefa atingo: en la pasintaj 50 jaroj ĈEL faris grandan klopodon por la diskonigo kaj utiligo de Esperanto en Ĉinio; ĝi sukcesis akiri subtenon



En julio 2002 Chongqinga E-Asocio okazigis someran semajnon

de ŝtata gvidantoj kaj eminentuloj, kaj fondiĝis el ili la societo Amikoj de Esperanto; ĝi aktive disvastigis Esperanton, en la tuta lando kelkcent mil personoj lernis nian lingvon. ĈEL eldonis multe da Esperantaj libroj kaj gazetoj; aktive partoprenis en la internacia E-movado, gastigis la 71-an UK-on, la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto kaj la 1-an Azian Kongreson de Esperanto, kaj plifortigis interkomprenon kaj amikecon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj.

La ĉefa problemo: malmultaj gejunuloj kaj geknaboj volas lerni Esperanton; mankas financa rimedo por la E-movado.

La 10-an de oktobro 2002 Chongqing-a E-Asocio organizis E-kurson en la Chongqing-a Universitato por 400 studentoj kaj instruistoj.



Rusia Esperantista Unio



Partoprenantoj de Rusiaj E-Tagoj en aŭgusto 2002 apud Kovrov

La retadreso: esperanto@au.ru, la hejmpaĝo: www.reu.ru. La oficiala diskutlisto: reu-agado@yahoogroups.com. Sidejo ne ekzistas, nek biblioteko, sed jes ja libroservo.

Bulteno de REU ene de REGo (*Rusia Esperanto gazeto*) aperas 6 fojojn jare. En 2001 REU havis 303 membrojn kaj 12 lokajn grupojn, la estraro estas 6-persona. La landa kongreso okazas ĉiun jaron kaj daŭras 3-4 tagojn. La komitatano estas Georgij Kokolija, la ĉefdelegito Andrej Lyskov. Ekzistas retaj kursoj: <http://subscribe.ru/catalog/job.lang.esperanto>, al kiuj aliĝis 6 000 homoj. La ĉefaj atingoj: bone funkcia libroservo, gazeto REGo, komputila kompaktdisko *Esperanto-2001* kaj muzikaj kompaktdiskoj



Serbia Esperanto-Ligo partoprenas en Foiroj de Neregistara Organizoj en Banja Luka.

Oraj kantoj 1 kaj 2. La ĉefaj problemoj: manko de sidejo, malmultnombro de fidindaj aktivuloj, kiuj povus memstare okupiĝi pri iu agadtereno.

Serbia Esperanto-Ligo

La adreso: Terazije 42, YU-11000 Beograd, Jugoslavio, tel. +381 (0)11 687 528. La retadreso: esperanto@yubc.net, la hejmpaĝo: users.yubc.net/~esperanto. La sidejo estas kune kun alia asocio, ekzistas libroservo (Terazije 42, Beograd). La bulteno *InfoSEL* estas eldonata 10-12 fojojn jare po 8 paĝoj. Membroj estas 120. La lokaj grupoj estas 10-12 kaj la estraro

estas 5-membra. La landa kongreso ne okazas (la lasta okazis en 1991, en Subotica). La komitatano ĉe UEA estas Radojica Petrović, la ĉefdelegito Milica Ristić-Dokmanović. Ne ekzistas perkoresponda kurso, la ĉefa atingo: DESKF. La ĉefa problemo: financaj problemoj kaj propra ejo por la laboro (por SEL kaj por la societoj).

Esperanto-Asocio de Suda Afriko

La retadreso: vonblottnitz@icon.co.za. La hejmpaĝo: www.esperanto.za.org. La oficiala diskutlisto: easa-membroj@yahoogroups.com. La sidejo: de la sekretario, privata. Ekzistas biblioteko, eta, en la domo de la prezidanto, kun ĉ. 100 volumoj. Ne ekzistas libroservo. La bulteno *Bona Espero* estas eldonata tri-foje jare, po 18 paĝoj. EASA havas 42 membrojn, aktivis 4 lokaj grupoj. La estraro estas 10-persona, la landa kongreso okazas ĉiun trian jaron kaj daŭras ses tagojn. Ekzistas perkoresponda kurso, la ĉefa atingo: akiro de heredaĵo, la ĉefa problemo: maljuniĝo de la aktivuloj.



Svisa Esperanto-Societo

Ĝi ne havas propran sidejon, do gastas ĉe esperantisto, sed havas propran hejmpaĝon www.esperanto.ch/SES. Ĝia biblioteko estas ĉe CDELI, dume la libroservo estas ĉe KCE. La bulteno *SES informas* aperas kvin fojojn jare. La membroj sumas je 170, kaj la lokaj grupoj estas 7. La SES-estraro estas kvin-kapa. Ĝi organizas landan kongreson ĉiun jaron kaj ĝia daŭro estas 1-2 tagoj. Pormomente estas nur la franclingva perkoresponda kurso, zorge de Claude Gacond. La ĉefa atingo estas ioma reaktivigo de la movado kaj modernigo de la laboriloj. La ĉefa problemo: stagnado kaj batalo kontraŭ malkresko; mankas homfortoj. SES eldonis tre belan plurkoloran informilon, kiun oni taksas tre interesa laŭenhave (vidu la pasintjaran aprilan revuon, p. 87).



La Esperanto-Societo de Novjorko kunvenas vespere la trian vendredon kaj tage la unuan dimanĉon monate. Ĝi bonvenigas gastojn!

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

La retadreso: elna@esperanto-usa.org; la hejmpaĝo: www.esperanto-usa.org. ELNA aktivis en luita sidejo. Ekzistas malgranda biblioteko kaj libroservo. La bulteno *Esperanto USA* aperas 6 fojojn jare kaj ampleksas 12 paĝojn. Membroj estas ĉirkaŭ 800; lokaj grupoj ĉirkaŭ 30. La estraro estas 13-kapa. La landa kongreso okazas ĉiun jaron kaj daŭras 3-4 tagojn. Ekzistas perkoresponda kurso, dekleciona, senpaga, kaj en 4 niveloj kontraŭpage. La ĉefa atingo: eldono de kelkaj tre utilaj libroj. La ĉefa problemo: manko de intereso pri Esperanto en anglalingvio.



Venezuela Esperanto-Asocio

La retpoŝta adreso: venesperanto@tutopia.com. La hejmpaĝo: www.esperanto-ve.org. La diskutlisto: esperanto-venezuela@yahoogroups.com. La sidejo estas propra de VEA. La volumoj de la biblioteko estas proksimume 250; la libroservo funkcias en la sidejo mem. La bulteno estas *Venezuela Stelo*, ĝi aperas dufoje jare, 16 paĝoj, redaktas ĝin Andrés Turrissi. VEA havas 32 membrojn. Estas nur unu grupo, la karakasa, esperantistoj estas almenaŭ en aliaj 5 urboj, sed ne organiziĝas. La Tutlanda Renkontiĝo okazas ĉiun trian jaron dum tri tagoj, la lasta en novembro 2002 (90-jariĝo de VEA). La estraro estas 13-persona. Ekzistas koresponda kurso, bazita sur la lernolibro *Sabe Ud. Esperanto* de Jorge Hess, tiu kurso estas prizorgata de A. Turrissi, sed plejofte la perkorespondaj lernantoj studas per retaj kursoj kiuj multas. La plej gravaj atingoj estas eldono de *Doña Barbara* de Romulo Gallegos, *La Agrikulturo de la Tropika Zono* de Andrés Bello, kaj *Kumeŭaŭa la Filo de la Gangalo* de Tibor Sekelj, hispanigita de Guillermo Alfredo Cook; vivteno de Esperanto en la publika konscio per artikoloj, intervjuoj ktp, kaj eldonado de *Venezuela Stelo* dum la lastaj pli ol 30 jaroj; aĉeto de propra sidejo; pliaj kursoj ĉiujare por komencantoj kaj progresantoj. La ĉefaj problemoj: ne kontentiga intereso por Esperanto inter la junularo kaj ne sufiĉaj lernantoj por la kursoj. Neaktivigo de la finlernantoj en la movado.



Fajsz-kolekto en ŝtata prizorgo

La grandioza E-biblioteko de Károly Fajsz ricevos lokon en Muzeo Fesztetich en Keszthely, urbeto ĉe la lago Balaton – ni skribis pasintjare (feb. '01, p. 31). Poste tamen alie, eĉ pli favore turniĝis la sorto de la Esperanto-Kolekto Fajsz, ĉiujare menciata en nia Jarlibro kiel unu el la plej grandaj E-bibliotekoj de la mondo. En marto 1997 (p. 43) Detlev Blanke ankoraŭ singarde vortumis: *La posedanto kontraktis kun la hungara kulturministerio ke tiu protektu la bibliotekon... oni povas nur esperi ke... efektive disponiĝos la necesaj financoj.*

Nu, la ministerio fine ja plenumis sian promeson, decidante en 2001 aĉeti la kolekton por ĉ. 44 mil eŭroj kaj transdoni ĝin al la zorgoj de la Tutlanda Fremdlingva Biblioteko, la instanco kiu jam en 1991 aperigis unuan parton de katalogo pri la kolekto (prezo: 33 eŭroj ĉe UEA; vidu recenzon en jul.-aug. '93, p. 132). La ĉ. 40-mil-era kolekto de Fajsz – kiu antaŭe preskaŭ tute okupis lian sesĉambran, urbocentran apartamenton – konsistas el 13 miloj da libroj, 18 miloj da periodaĵoj grandparte bindotaj, kaj el miloj da fotoj, filatelajoj, medaloj, insignoj, afiŝoj, flagoj, muzeaĵoj, objektoj de famaj esperantistoj ktp.

Kadre de eta festo la 11-an de aprilo, ŝtatssekretario László Baán gratulis la Fremdlingvan Bibliotekon pro la akiro de la kvara plej granda Esperanta kolekto de la mondo (post Internacia E-Muzeo en Vieno, Biblioteko Butler de Brita E-Asocio kaj Biblioteko Hodler de UEA). Laŭ komento de la plej legata hungara taggazeto, *Népszabadság*, “ĉi tiu nova eblo povus redoni elanon al la intereso pri la Zamenhofa galaksio, intereso lastatempe malkreskanta laŭ bibliotekistoj”.

La libra parto de la kolekto estos, post kelkaj monatoj, publike alirebla en elstara loko, sur la galerio de la ĉefa legosalono. La revuoj, gardataj en kela tenejo, estos laŭpete konsulteblaj. Oni planas ke fakuloj elektronike prilaboru la bibliografiajn donitaĵojn kaj kreu interrete alireblan katalogon. Jam prepariĝas nova surpapera katalogo, kiu baziĝos ne sur la katalogo el 1991, sed sur la ĝisdata bibliografia sliparo. Sola negativajo: la kolekto estas “fermita”, t.e. ĝi ne plu kreskos per novaj akiraĵoj.



Károly Fajsz, Honora Membro de UEA

Vendis sian ĝardenon

Lerminte Esperanton en 1963, Károly Fajsz preskaŭ tuj fariĝis pasia kolektanto. Por financi siajn aĉetojn, li iom post iom vendis siajn frukto-ĝardenon kaj gepatran domon, eĉ meblojn el sia loĝejo. Li opinias posedi ĉ. 95 procentojn de ĉiuj Esperantaj eldonaĵoj aperintaj ĝis la 1970-aj jaroj, sed poste, precipe ekde 1990, la inflacio lamigis lian kolekton kaj interŝanĝan agadon.

En 1982 la Kolekto Fajsz ricevis ŝtatan protekton, kaj promesojn pri disponigo de komputilo, kopiilo, favorpreza bindado, eĉ pri kontribuo al la lupago de la apartamento. El la promesoj realiĝis nenio krom kelkmonata pagado de helpmono. Kontraste, pro la ŝtata protektateco Fajsz ne plu rajtis vendi sian kolekton, eĉ ne kiam aperis japana propono je sumo kiu nun valorus ĉ. 200 mil eŭrojn.

Oblikve fronte al la Budapeŝta Operdomo, sennombraj vizitantoj kaj esplorantoj ĝuis tra pli ol tri jardekoj la gastamon kaj helpemon de s-ano Fajsz, kiu neniam celis starigi sterilan monumenton el papero, sed ĉiam strebis estigi vivan flegejon de nia kulturo.

Károly Fajsz jam en 1994 ricevis la plej altan ŝtatan distingon iam donitan en Hungario pro esperantista agado – kaj nun lia vivoverko fariĝas vivanta, publika, por ĉiuj alirebla parto de la hungara kulturo.

István Ertl patro, István Ertl filo



Granda parto de la kolekto nun estas publike konsultebla en elstara loko, sur la galerio de la ĉefa legosalono de la Fremdlingva Biblioteko.



Nia korespondanto Dafydd ap Fergus, estro de la Komunikad-Centro de Eŭropa Esperanto-Unio en Bruselo, subtenata de UEA, informas pri la lingva situacio en la mondo kaj la batalo de esperantistoj kontraŭ lingva diskriminacio.

La angla furiozas en Japanio

En la japana urbo Ota estos en 2004 malfermita dulingva lernejo. Dulingva en la senco ke la instruado estos ĉefe en la angla. Kelkaj fakoj, kiel la japana lingvo kaj sociaj studoj, daŭre estos instruataj japane en la publika lernejo. La celo de la urbestro sendube estas pretigi eliton de almenaŭ 380 infanoj el Ota, kiu povos konkurenci sur la internacia labormerkato. La dulingva lernejo estas signo pri tio, ke pli kaj pli da japanoj timas pri siaj konoj el la angla lingvo.

Rimarkeblan influon de la angla al la japana pravas gairaigo – stoko da *pruntitaj vortoj* ĉefe el la angla. Lingvistoj taksas ke preskaŭ dek procentoj de la vortoj en novaj japanaj vortaroj estas *pruntitaj* el la angla. La ĉefministro Junichiro Koizumi eĉ komencis kritiki siajn proprajn ministrojn pro troa uzado de angladevenaj vortoj. La oficiala Nacia Instituto

por la japana Lingvo proponas vortaron kun malpermesataj vortoj por solvi la problemon kaj samtempe petas pli da financa subteno de la registaro. Vortoj malfacile elparoleblaj por japanoj, kiel ekz. *digital camera* (komputila fotilo), fariĝis *degitaru kamera*. Post iom da tempo junuloj parolas eĉ pri *digi kamey*. Problemo estas ke *kamey* similas al *testudo*. Dot-com estas nova firmao uzanta retadreson kun .com, sed ĝi similas al adjektivo kiu signifas *svarmegi*.

La prezidanto de japana Esperanto-Instituto Zyūn'iti Sibayama ne timas pri konfuzo por angladevenaj vortoj. En *dot-com*, prononcata en la japana kiel *dotto komu*, li opinias, ke la konfuzo kun *svarmegi* ne okazos, kaj ev. miksiĝo estos bona temo por ŝercado. Alia japana esperantisto Satoru Nishikawa opinias: *Komuna lingvo devas esti neŭtrala lingvo por ĉiuj nacioj. Se oni povas esprimi ion per la japana lingvo, oni devas esprimi tion japanlingve.*

En la ĉiutaga vivo ne necesas uzi la anglan. La uzado de la angla ĝenerale estas limigita al kelkaj universitataj kursoj kaj specifaj departementoj de grandaj internaciaj firmaoj, diras Nobuyuki Tukahara de Nagoya Universitato. La entuziasmo por lerni la anglan ne kongruas kun la vera bezono por anglalingvaj konoj en la japana socio. Oni povas diri ke la kaŭzo de ĉi tiu fenomeno estas la lingva ideologio. Tukahara plendas ke ĉi tiu ideologio en Japanio enradikiĝis ĉe normalaj civitanoj. Multaj homoj lernas la anglan sen havi urĝan bezonon por tio. Ili volonte faras anglalingvajn

ekzamenojn kaj pagas pro tio el la propra poŝo. Ni ne forgesu ke en 1997 la enspezoj de privataj lingvaj akademioj atingis 992 220 000 eŭrojn.”

UEA gajnis tempon

Fine de novembro la UEA-prezidanto Renato Corsetti petis kaj ricevis pli da tempo por prepari oficialan respondon al la eŭropa mediaciisto Jacob Soederman. Corsetti bezonis plian monaton por prikomenti la respondon de la Eŭropa Komisiono rilate al la oficiala plendo de UEA pro la lingva diskriminacio ĉe eŭropaj organizoj. Por pli kaj pli da kandidatoj por internaciaj postenoj de Eŭropa Unio, sed ankaŭ de Unuiĝintaj Nacioj, bona aŭ bonega scipovo de la angla ne sufiĉas. Kreskanta nombro de dunganoncoj fare de la internaciaj organizoj celas nur denaskajn parolantojn

de la angla (*English mother tongue*, “*English native speaker*”).

En sia respondo al la eŭropa mediaciisto Jacob Soederman, Eŭropa Komisiono finfine akceptis niajn argumentojn kaj ne tiujn de influvovaj lobiistoj de internaciaj firmaoj por kiuj lingvo estas nur ilo, diras Corsetti. Post la venko de diversaj Esperanto-asocioj, la oficiala starpunkto de Eŭropa Unio nun estas ke la postulo pri denaska scipovo de la angla por eŭropaj postenoj, oficiale malfermitaj al civitanoj de ĉiuj membrolandoj, povas esti konsiderata kiel

Britio: Eĉ anglalingvanoj timas pro la povo de la angla (Brita Turisma Agentejo)



diskriminacia.

UEA devis respondi al Soederman antaŭ la 31-a de decembro. La ĉefa malfacilaĵo estas la longeco kaj komplikco de la 45-paĝa dokumento sendita de la Eŭropa Komisiono. Strange, la Eŭropa Komisiono nun asertas ke dunganoncoj por “denaskaj aŭ samnivele parolantoj de la angla” ne estas diskriminaciaj, diras Corsetti. En ĝia respondo, la Eŭropa Komisiono malkovris ke ĝi konsilas al la dungantoj ne uzi tiun vortumon (t.e. denaska parolanto de la angla) por eviti ke nedenskaj parolantoj ne kandidatiĝu. Corsetti: Evidente, Eŭropa Komisiono volas minimumigi la jurajn “riskojn” post la agnosko de la diskriminacia naturo de dunganoncoj por denaskaj parolantoj de la angla. Serioze konsideri la uzadon de neŭtrala lingvo kiel Esperanto por eviti la lingvan diskriminacion en eŭropaj organizoj evidente ankoraŭ estas tabuo ĉe la Eŭropa Komisiono.

La oficialaj dokumentoj estas legeblaj ĉe: <http://uea.org/esperanto.p/dokumentoj/plendo/plendo.html>.

Litovaj instancoj tre serioze traktas Esperanton

La revuo starigis kelkajn demandojn al la prezidanto de UEA Renato Corsetti, kiu en majo vizitis, kun la vic-prezidanto Lee Chong-Yeong, la landon de la 90-a Universala Kongreso en 2005, Litovion.

❖ Kiajn novaĵojn vi alportis el Litovio?

Tre bonajn novaĵojn! Ni renkontis kaj la litovajn esperantistojn kaj la litovajn instancojn. Ĉiuj estas laboregantaj por ke la kongreso estu sukcesa: verŝajne ĉar Litovio estas malgranda lando, ĉar Zamenhof loĝis ankaŭ tie, ĉar Klara venis de tie, ĉar ili konsideras ke esperantistoj ekiris al la mondo el Litovio kaj estas konvinkitaj, ke Litovio estas la naskiĝlando de Esperanto... Do ili ĉiuj laboregas kaj antaŭvidas grandan kongreson kun almenaŭ 3000 homoj. Cetera neniam en la historio okazis en Litovio Universala Kongreso de Esperanto.

❖ Krom la probabla enlanda sukceso, ĉu vi supozas ke la UK estos ankaŭ internacie sukcesa? Ĉu tamen Litovio ne estas iom ekster la cetera mondo?

Jes, ĝi estas relative ekster la cetera mondo, malgraŭ tio, ke en Litovio mem oni insistas ke la geografia centro de Eŭropo estas en iu vilaĝo apud Vilniuso, laŭ kalkulo de geografoj. Sed efektive ĝi estas iom ekster la ĉefaj turismaj fluoj en la mondo. Litovio tamen havas favoran pozicion en la senco ke ĝi estas inter okcidenta Eŭropo, el kiu oni relative facile tien povas veturi, kaj orienta Eŭropo, ĉar el Rusio kaj el ĉiuj eksocialismaj landoj oni relative facile atingas Litovion. Kaj estas ankaŭ la nordaj landoj, Svedio ktp, el kiuj oni facile vojaĝas al Litovio. Centro la problemoj por

ekstereŭropanoj, kvankam la azianoj, ekz. la japanoj, kiuj estas tradiciaj vizitantoj de UK-oj, povas relative malmultekoste flugi de Tokio al Moskvo kaj de tie al Litovio. Por la sudamerikanoj estas iom malpli facile, ĉar ili devas unue salti al Parizo aŭ Amsterdamo kaj de tie havi postan flugon. Oni tamen havas realan esperon, ke la kongreson vizitos 3000 kongresanoj.

❖ Ĉu vi povus rememori pri iu kuriozaĵo, kiu eble povus vekii la intereson de esperantistoj pri Litovio?

Litovujo estas tre norda lando por mi, en la senco ke ĝi estas tre pura. Eblas demandi sin, kien oni ĵetas paperojn kaj cigaredstumpojn, ĉar la lando estas vere tre pura.

Kio eble povus interesi esperantistojn estas la fakto, ke la litovaj instancoj traktas Esperanton tre serioze. Mi kun Lee Chong-Yeong vidis preskaŭ ĉiujn prezidantojn

de parlamentaj komisionoj, la prezidanton de la parlamento mem, almenaŭ tri ministrojn pri edukado, pri eksteraj rilatoj, pri kulturo, la rektoron de la universitato, kaj ĉiuj tute normale traktas Esperanton serioze kaj atendas ke ĝi fariĝu io tre konata en la lando. La komunikiloj, la ĵurnaloj, la radio, la televido intervjuis nin, aperigis artikolojn ktp, estas io kion ni kutime ne trovas en okcidentaj landoj.

Intervjuis Stano Marček



Gazetara konferenco en la novaĵ-agentejo BNS (Baltic News Service)

▶ Anglalingvanoj plendas

La ŝajna venko de la angla tra la mondo plaĉas ne al ĉiuj en Britio. Ian Fantom, redaktoro de EAB NetNews, la retgazeto de Esperanto-Asocio de Britio, timas pro la falanta intereso kaj kono pri fremdaj lingvoj. *Mi emas emfazi la malavantaĝojn por la britoj. Alie multaj dirus 'bone por la angla'. Tamen jam britoj komencas diskuti pri la scenaro en kiu finfine ĉiuj estos dulingvaj escepte de la britoj, kun tono ke tio estus malavantaĝa por ni, klarigas Fantom. La vorto de Fantom montras la validecon de la Praga Manifesto eĉ por denaskaj parolantoj de la angla: Nur malgranda procentaĵo el tiuj, kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado.*

Komence de la pasinta jaro la brita edukadministrado permesis al infanoj ne plu studi fremdajn lingvojn post la 14-a jaro. Kaj eĉ la tradicie lingve nekonscia brita gazetaro komencis vekiĝi pro diversaj signoj de negativa efiko al lingva lernado de la edukaj ŝanĝoj. La eduka suplemento de unu el la plej respektataj anglaj gazetoj, *The Times*, lanĉis publikan debaton per artikolo titolata *Lingva edukado je la sojlo de krizo*. Laŭ antaŭa studo de la Centro por Informado pri Lingvoinstruado kaj Esplorado (CILT), nur 50% de la lernejoj,

kompare al 73% en septembro 2000, instruas lingvojn al la infanoj. La studo de CILT indikas gravan malalti on en la nombro de lingvaj lernantoj en Britio. Ĉu unulingvaj parolantoj de la angla havos la samajn ŝancojn je laborpostenoj en la multlingva sed lingve malegala Eŭropo? Jam nun tiuj britoj kiuj ankoraŭ lernas aliajn lingvojn, plendas ke eŭropanoj nur volas praktiki la anglan kun ili.

Subtenu La Komunikadcentron

Mondonacoj por la Brusela Komunikadcentro estas tre bonvenaj. Se vi volas subteni ĝin, bv. noti la kodon de la konto ĉe UEA: eece-p.

Por ekscii pli pri la agado, legu nian raporton ĉe www.lingvo.org/raporto. Superrigardo pri la gazetara agado, kaj kolekto de publikigitaj artikoloj, konsultebblas ĉe: www.lingvo.org/eo/*gaz. Por legi ambaŭ dokumentojn entajpu la kaŝvorton *saluton*.

Johan Derks, kasisto@lingvo.org,
Kasisto de la Brusela Komunikadcentro

La interreta ŝanco de Esperanto

Profesoro Luis Guillermo Restrepo Rivas estas specialisto kaj esploristo pri artefarita intelekto, aŭtomata tradukado, robotiko, gvidanto de esplorprojektoj en Politeknika Universitato de Kolombio kaj instruisto pri interreto. Jen lia propono kiel ekspluati la ŝancojn de interreto.

Interreto estas decidiga ŝanco por la estonto de Esperanto: ĉu por *Esperanto venkonta* ĉu por *Esperanto venkota*. Esperanto venkos en la mondo, se ĝi venkos en interreto.

Rilate Esperanton la reto povas ludi tre ekstremajn rolojn: la plej granda danĝero aŭ la plej granda helpanto.

Ni, kiuj volas helpi Esperanton atingi ĝian celon esti mondskele disvastigita kaj komune akceptata kiel La Internacia Lingvo, devas profiti favore al nia lingvo la grandan povon kiun interreto havas por esti nia plej granda helpanto.

Faktoj

Interreto estas ege grava por iu internacia lingvo: la *babela problem*o, kvankam konata teorie de multaj homoj, estis antaŭe travivata, vere spertata, nur de malmultaj homoj. Nur tiuj kiuj havis sufiĉan monon, socian tavolon, aŭ intelektajn interesojn por vojaĝi aŭ interilati per legado, poŝto aŭ telefonado internacie kun aliaj homoj.

Nun, interreto estas la populariganta tutmonda *unika fenomeno*, kiu frontigas ĉiujn homojn antaŭ la lingva *diverseco*. Ĝi portas tekstojn kaj voĉojn el foraj landoj kaj en strangaj lingvoj ĝis la tablo, kaj – baldaŭ – ĝis la poŝto de iu ajn homo, en maniero multe pli vasta ol kurtonda radio kaj satelita televido. Samtempe la reto permesas ke propra persona esprimo estu konata tuj en foraj landoj, en maniero multe pli facila ol kiun ebligis posedo de presilo, radia aŭ televida sendilo.

Tiel la *babela problem*o tuŝas, por la unua fojo, ĉiujn individuojn, kaj la batalo por la pozicio de internacia lingvo jam ne estas nur disvolviga en la politikaj, diplomataj kaj komercaj sferoj, sed en la reto, je vere populara nivelo.

Nuntempe ne malpliigas la graveco de tiuj ceteraj menciitaj sferoj en kiuj unue kaj tradicie sentiĝis la bezono de komuna lingvo, tamen la nuna pli granda akirebleco de scio kaj teknologio produktas plialtiĝon de la povo de individuoj kaj homgrupoj, ne nur milita sed ankaŭ informa kaj komunikada.

La individuoj kaj homgrupoj nun havas la kapablon esti rimarkinde povaj aktoroj en la batalo por solvi la babelan problemon. La nuntempaj individuoj devus konsciigi pri tio, pri sia povo ankaŭ en tiu ĉi afero tutmonda.

Proponata agadplano

Simile kiel interreto rapide disvastigis tutmonde sciojn pri teknikaj aferoj (ekz. *Linux*, *Java*, *HTML*), kaj senpagaj programoj de *GNU*, la reto povas esti profitata far Esperanto por rapide disvastiĝi kiel la plej bona solvo por la *babela problem*o: *senpaga, facila kaj efika lingvo internacia*.

Por tio, mi proponas jenon: kvankam eble mi kontraŭas ĉi-rilate la opiniojn de kelkaj instruistoj, mi opinias ke la reguleco de Esperanto ebligas lernadon multe pli efikan ol



Luis Guillermo Restrepo Rivas

tiu celata en la plimulto da lernolibroj, kiuj ŝajnas inspiritaj el nacilingvaj lernolibroj, ĉar tiaj lingvoj estas ege neregulaj kaj malfacilaj. Tiaj instrumentodikoj – mia opinio kaj miasperite – metas aferojn kaj ripetadojn kiuj en Esperanto estas nenecesa balasto por la baza lingvo-akiro.

Eblas desegni la plej efikan *Esperanto-kurseton por ĉiu nacia lingvo* kaj meti ĝin en la reton, por ke iu ajn homo povu elŝuti ĝin *senpage kaj senkopirajte*.

Ekzemple, en kelkaj kazoj oni povas profiti maksimume la similecojn inter vortoj aŭ gramatikaĵoj de Esperanto kaj de la nacia lingvo. Kie tio ne eblas, la nura reguleco de Esperanto ebligas ekonomion en la prezento de la baza gramatiko kaj

vortaro, simple *nekredebla* kompare kun tiuj de naciaj lingvoj.

Mi ne diras ke iu ajn homo, lerninta el tia kurseto, verkos baldaŭ beletron konkursindan, sed certe akiros esprimivon je nivelo kiu en iu ajn nacia lingvo postulus multege da tempo, mono kaj mensa streĉo. Tio estas komenco.

La ideo pri tiaj kursetoj ne estas nova, ekzistis presaĵoj kun la nomo *ŝlosilo de Esperanto* por pluraj lingvoj, sed bedaŭrinde ŝajnas ke oni tiom kritikis ilin, ĝis malaperis ilia eldonado. La ideo estas en tiu linio, kaj eble pli en la linio de *Fulmo-kursoj*, kiuj ankaŭ ekzistas en Esperantio.

Mia propono, do, estas:

1. Desegni tiajn bazajn kursetojn, lernolibretojn, specife kaj plejefike celitajn por ĉiu nacia lingvo.

2. Meti en interreton tiujn lernolibretojn, elŝuteblajn *senpage*, *senkopirajte*, kaj kun permeso por kopii, presi, multobligi kaj disdoni ilin.

3. Amase reklami pri la ekzisto de tiuj lernolibretoj.

4. Fari la samon, *senpage kaj senkopirajte*, kun aliaj jam ekzistantaj kaj novaj lernolibroj kaj legolibroj en Esperanto.

La nuntempa kaj estonta akiro de scioj estas kaj estos pli rilata al memlernado ol al instruado. Do, ni devas faciligi kaj disvastigi la rimedojn por *memlernado* pli ol insisti en la trejnado de instruistoj, kiuj ĉiam restos nesufiĉaj por la nombro de parolantoj kiun ni celas.

Ni povas profiti la reton por okazigi favore al Esperanto la saman fenomenon de perreta rapida (eĉ "virusa") dis-konigado, kiu okazas pri teknikajoj kiel *Linux*.

Ni devas fari ke interreto estu ilo por la triumfo de Esperanto. La ecoj kaj karaktero de nia lingvo faciligas tion, sed necesas nia helpo por montri ĝin al la popolo kaj ebligi la akiron de la lingvo en la plej apartaj mondopartoj.

Esperanto venkos en la mondo aŭ estos venkita en la mondo, se ĝi venkos en interreto aŭ estos venkita en interreto.

Luis Guillermo Restrepo Rivas
<http://LuisGuillermo.com>



Elisabeth Schwarzer pri Interkultura kompreniĝo en praktiko



Novembra Malferma Oficejo en Roterdamo

Ĉu li erarkalkulis? Cent subskriboj en la gastlibro, konstatis UEA-oficisto la 30-an de novembro, kiam la roterdama oficejo denove invitis al Malferma Tago.

Jam estas tradicio ke la Centra Oficejo organizas dufoje en la jaro tagon kun la ebla ĉeesti prelegojn, aĉeti globskribilojn kun surskribo "Esperanto", konatiĝi kun la oficistoj kaj aliaj membroj. Mi mem ĉefe utiligis la okazon konversacii kun UEA-aktivuloj kutime ne estantaj en tiu urbo.

Nederlanda Esperanto-junularo havis la bonan ideon samtempe inviti posttagmeze al komuna vizito de muzeo pri arkitekturo, fakte taŭgega solvo por tiuj kiuj ne la tutan tagon volas umi en la oficejo, kaj kiuj ŝatas konatiĝi kun Roterdamo mem. Slovakino karakterizis ĝin „freneza“: laŭta, bunta urbo, en sia speco tute ne komparebla kun multaj metropoloj en orienta Eŭropo.

Reveno post du jardekoj, tion la Malferma Tago signifis por Elisabeth Schwarzer el Berlino, kiu arangis

interkulturajn/interkonatiĝajn laborgrupojn. Stano Marček iom pli ofte estas en Roterdamo, kvankam li kutime laboras en Slovakio – la legantoj de la revuo *Esperanto* konas lin. Li mem siavice tre scivolemas pri la legantoj, iliaj deziroj, miroj, ideoj, kaj enketis pri tio kaj papere kaj en prelego kaj demando-rondo. Sur lia portebla komputilo oni jam povis vidi la paĝojn de la decembra eldono.

Generala UEA-Direktoro Trevor Steele ŝajnis kapabli esti samtempe en la kvar malsamaj etaĝoj, prizorgante la gastojn, respondi al demandoj, helpi je problemetoj. Ankaŭ la aliaj oficistoj kontribuis al tio, ke la Malferma Tago kun sia programo havas sian firman lokon inter la Esperantaj renkontiĝoj en Nederlando. Certe bona okazo por ĉiuj, kiuj tiam hazarde troviĝas iom proksime.

Ziko Marcus Sikosek, Germanio



Stano Marček prelegas pri redaktado



fotoj: Joost Witteveen

El la poŝtkesto



Kia sinsekvo?

Leginte la kompletigon (okt., p. 205) de Renato Corsetti al la sub-ĉapitro *Personaro* de la *Estrara Raporto 2001* (jun., p. 129), mi tamen devas konstati ke ĝi ne sukcesis kompensi la mankon de sinsekveco kaj kohero en tiu subĉapitro. Laŭ tiu teksto, unue la estraro nomumis oficejan komisionon; due montriĝis ke la etoso en la oficejo estas streĉa; trie la estraro elektis Trevor Steele kiel ĝeneralan direktoron, kaj fine Buller, Zapelli kaj Ertl forlasis la CO-n. Verfidela prezento estus tute ali-orda: unue la etoso streĉiĝis inter la CO kaj la Estraro (apenaŭ "en" la oficejo); due, Buller, Zapelli kaj Ertl decidis forlasi siajn postenojn, ĉar pro negativaj spertoj el la antaŭa Estraro ili ne povis plene akcepti la konsiston de la nova (sep. 01, p. 148); trie ekestis la oficeja komisiono, kaj kvare estis dungita Steele; fakte, jam en 2002. István Ertl (Belgio)

Fekundaj semeroj

Aliaĵojn al Trevor Steele pro lia klarmensa rezonado kaj teksto en la revuo *Esperanto*, jul.-aŭg. 2002. Delonge mi frapas la saman klavon, kun averto ke lingvohegemonio pli efikas ol nuklea armilo, por konkere faligi la suverenecon de landoj, kiuj neglektas reagi kontraŭ la fremdlingva invado, helpata de perfiduloj. En Brazilo turistoj, promenante en urbe, povas facile ricevi la impreson, ke ili vizitas antaŭurbon de angla aŭ usona provinco pro tiom da fremdlingvaj nomoj de vendejoj, servoj, varoj. Nialanda prezidento, poligloto, ne zorgas. Male. Kiam li veturas eksterlande, li tute neglektas sian rajton, laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, paroli sian naciajn lingvon. Se la homaro kaŝolas invadantojn, ni, malmultaj revemuloj, restu fekundaj semeroj, kun espero ke multobliĝos prudentuloj antaŭ ol formortos ĉiuj minoritataj lingvoj.

Sergio Otto Vaske, Brazilo

Por praktike uzi ĝin

Kun ega intereso mi legis la artikolon *Lerni Esperanton por praktike uzi ĝin* kaj mi tute konsentas pri via vidpunkto. Laŭ mi, ĝis nun Esperanto ne estas sufiĉe uzata por fakaj celoj en la plej diversaj medioj.

Mi ja scias, ke multe pli facilas teoriomadi ol realigi konkretaĵojn, sed mi bedaŭras ke inter la 88 fakaj asocioj listigitaj en la Jarlibro 2001 la pli multaj estas nur surpaperaĵoj. Kiom el ili vere aktivas, kunlaborante kun neesperantistaj samfakaj medioj? Same kiam vi mencias ke pli ol 50 fakaj kunvenoj okazas dum UK: ĉu vere eblas serioze labori dum 1-2-hora kunveno? Mi preferus legi ke tiom da kunvenoj okazis kadre de neesperantistaj internaciaj kongresoj de samfakuloj. Aŭ, kiel faras IKEF, ke okaze de UK pli ol 50 fakasocioj organizis tut- aŭ duontagan aranĝon kun landaj samfakuloj dulingve (Esperanto + la lingvo de la UK-urbo).

Prave, vi substrekas en via artikolo ke internaciaj fakkunvenoj de esperantistoj estu okazo por ekkoni samfakulojn de la lando kie la kunveno okazas.

Aliaj ebloj estu klopodi havi E-angulon en nemovadaĵ tte-etoj. Mi pensas i.a. pri www.boliviantti.org, kiu pritraktas la aplikadon de suna energio (franca-hispana-Esperanto), aŭ pri Fonduso Ariadne www.ariadne-eu.org, aktiva en

universitataj medioj (angla-franca-Esperanto), kun kiu ekkunlaboras areto da E-tradukemuloj por pliriĝi la E-parton de tiu tte-eto.

En tia E-angulo endas menciigi ligilojn i.a. pri retaj E-kursoj. Mi pensas ekz. pri la brita sindikata tte-eto www.labourstart.org/ eo kiu ekzemple mencias 2 200 e-ligilojn. Tiaj agadoj povus veki pli da intereso pri Esperanto, uzata tiam kiel "normala" lingvo apud gravaj lingvoj. Mi esperas ke multaj esperantistoj plene konsentos pri la enhavo de via mesaĝo kaj ke ili strebos konkretiĝi viajn ideojn. Taŭga aplikado valoras multe pli ol 1 000-paĝa argumentado!

Aktiva kaj pozitiva kunlaborado kun neesperantistoj estas eble la plej efika metodo por havigi al ili motivon eklerni la lingvon. Oni lernas la anglan nek pro idealo, nek por klubumi aŭ ĉeesti "inter-ni-kongresojn", sed por utile uzi ĝin; esperantistoj pripensu tion kaj klopodu realigi sanan ekvilibron inter necesa idealismo kaj nepra realismo!

Germain Pirlot

Utilo de la Jarlibro

Mi volonte helpas vin ripari la mankon rilate al la utilo de la Jarlibro kaj ĝia Delegita Reto kiel informiloj pri la praktika utilo de Esperanto. Mia edzino Anna-Lisa faris la ĉi-suban foton kaj mi donas la historion jene:

Jurnalisto venis intervjui min pri la nova (kaj unika) ekumena diserva libro *Adoru*. Li demandis, kiom da esperantistoj estas proksimume. Mi elpoŝigis mian Jarlibron de nia pinta asocio UEA, kaj montris la preskaŭ 100-paĝan parton de la delegita reto, dirante: *la nombron de esperantistoj mi ne scias, sed jen, rigardu la grandan kvanton de senpagaj delegitoj, en preskaŭ ĉiuj mondpartoj, pretaj servi al ĉiuj scivolemaj membroj!* Mi ricevis tutpaĝan artikolon, ne nur pri *Adoru*.

Åke Ahlérn, Svedio



Åke Ahlérn kun la ĵurnalisto

foto: Anna-Lisa Ahlérn



Guebla kaj esplorinda mondo

Rakontoj ne nur ŝercaj. Vladimír Váňa. Ilustris: Pavel Rak. Dobřichovice (Prago): Kava Pech, 2002. 128p. ISBN 808585354-X. Prezo: € 9,90.

Ĉu ŝerco, ke la unuaj rakontoj en la kolekto *Rakontoj ne nur ŝercaj* estas la plej nuraj kaj la plej malŝercaj en la tuta libro? Oni povus facile senkulpiĝi leganton, kiu, tramaĉinte dekon da paĝoj, forĵetus la volumeton, kredante sin trompata de la aŭtoro kaj eldonejo. Tamen per pacienco venas, se ne ĉi-foje scienco, scio – scio, ke la mondo de Vladimír Váňa certe esplorindas.

La rakontoj, entute 19 plus ne tre konvinka teatraĵeto, plejparte radikas en la socialismo de la 60-aj jaroj. *Kiel grava estas la plano*, ekzemple, primokas la tiaman ŝtatistimon: kamparano kantigu unue ŝtatigitan kanarion, poste bovon, ĉar “ŝtata plano estas ŝtata plano: tiun oni ne povas ŝanĝi” (p. 74). Simile, burokratismo estas la celo en *Kiel kondutas al ni kelkaj oficistoj*.

Sed plej memorindas la rakontoj, kiuj transsaltas la epokon, en kiu ili estas koncipitaj, kaj kiuj fariĝas senepokaj, do ĉiamaj, ĉiesaj. Ekzemple *Kisteho*: tie ĉi ĉefrolas avareco, trompemo; temoj eternaj, klasikaj, tamen en la rakonto de Váňa freŝaj, aktualaj. Klarigo de

kisteho – kiun mi ne malkaŝas – troveblas en la rakonto (ne en vortaro) kaj miaopinie bone resumas la filozofion de Vladimír Váňa.



Same vantemo: legindas *Kiel mi eniris Parnason kaj Kelkaj konsiloj*, kiel facile kaj rapide fariĝi verkisto. Jen juveloj, kiuj per simpla, klara lingvo brilas. En *Kelkaj konsiloj*... ni lernas, ke redaktoro devenas de redaktoro, ĉar redaktoro devas esti ia doktoro, ia kuracisto de ĝis nun ne eldonitaj verkoj (p. 48). Trafel!

Kaj nepre menciindas la – jam konata – absurda sed klasike komika *Kiel ni mortigadis leporon por la antaŭkristnaska vespermanĝo*. La stilo kaj enhavo memorigas pri la rakontaro de J. H. Sullivan – sed juĝu, ĝuu vi mem. Ĉiaokaze valoras akiri la libron, se nur pro la Váňa-a leporo – kiu permesas indulgeme pretervidi etajn presmakulojn (ekzemple en la teatraĵeto, kie meze de kursivigitaj frazoj – literoj foje malkursiviĝas). Jen eble kroma ŝerco en la plejparte gueblaj *Rakontoj ne nur ŝercaj*.

Paul Gubbins

Senkovre

Dis! Sten Johansson (1950). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2001. 135p. ISBN 90 71205 95 98. 21cm. € 12,60.

En sia nova volumo Sten Johansson utiligas metodon ne sentradician en la Esperanta literaturo: similan praktikis antaŭnelonge membroj de la tn. *ibera skolo* en siaj *Ekstremoj*. Temas pri libera asociado laŭ elektitaj(f) vortoj(f) – ĉi-kaze la prefikso “dis”. Tiu vorteto fariĝos ankaŭ titolo de la tuta rakontaro, kies diversaj pecoj estas praktike sendependaj; kunligas ilin la unua-persona rakontado de la aŭtoro “alter ego” nomata “Peter”.

Dektri mallongaj historioj prezentas la tutan vivociklon de la protagonisto, homo profunde malkontenta pri sia vivo, al kiu feliĉo neniam ĉeestas, nur postfeste rememoreblas. En tiu plej multe rolas kontaktoj kaj kunigoj al virinoj – ŝajne nature kaj memkompreneble. Ja ĉiuj gravaj aferoj de la vira vivo ligiĝas al la alia sekso: ankaŭ ĉi tie krom *amoj*, *amindumoj* kaj *amoradoj* ankaŭ *filo* kaj *morto* pritraktiĝas ligite kun diversaj inoj. Nuraj pli-malpli senvirinaj temoj estas *infanaĝo*, *psikodramo* kaj *esperantistumado*.

En la lerte konstruita strukturo unuopajn ĉapitrojn kunligas alispecaj teksteroj: penumadoj de la sama rakontisto dum aŭtobusa vojaĝo al sia lasta amatino. La diversaj rakontoj naskiĝas el tiuj meditadoj, ili estas kvazaŭ enprofundiĝoj en

la propran memoron, inspiritaj de specifaj scenoj dum la veturo. Sama tekniko aranĝas la materialon ankaŭ ene de la ĉapitroj, kaj tio foje jam montriĝas iom troa, peza ludo pri la rakontaj tempoj. Tamen fine la ĉefaj fadenoj renkontiĝas, tiel la fermo de la libro fariĝas surpriza, eventuale eĉ ŝoka.

Ĉiokaze la asocia funkciado de la cerbo ne ĉiam donas la rakontan koheron dezirendan. La volumo kiel tuto restas sur la nivelo de anekdotismo: malgraŭ la mikso de interna tempoordo la rakontetoj estas unudirektaj, rekte kompreneblaj vivobildoj, kvazaŭ memportretoj de la artisto el siaj diversaj aĝoj. Ili ofte spritas kaj saĝas, aliflanke foje ne sukcesas eviti la kaptilon de banalo kaj naivo. Kelkloke melodrameco minacas – sed tio kutime okazas al verkoj nur iomete personecaj. Tamen se leganto akceptas rekonii siajn proprajn spertojn ekz. en priskriboj de amrilato, certe oni tuj fariĝos multe pli komprenema pri tiu peko de sincereco.

La ĉapitro *Librojn legu la verkisto* estas samtempe la plej sprita kaj plej pensiga parto de la volumo. Tie Johansson kun simpatia memkritiko kaj ironio parolas pri sia rilato al esperantismo. Krom la ideo fondi Federacion de Esperantaj



Kabeintoj (FEK) li starigas ankaŭ kelkajn vere provokajn demandojn, kiel ekzemple: *Ĉu povas esti tiel, ke esperantistoj suferas pro ia psika manko de kapablo komuniki kaj interilati, sed tiun mankon ili ne konscias ĉe si mem, sed male atribuas al la ĉirkaŭa mondo?*

Artismaj penoj delogas la verkiston ĉefe komence kaj fine de liaj rakontoj. En tiuj streboj al trafaj titoloj kaj frapaj lastaj frazoj plej ofte aperas ankaŭ metaforaj priskriboj. Bedaŭrinde ankaŭ Johansson suferas de kutima malsano de Esperantaj verkistoj: li volas mem zorgi pri la tuta literatura procedo, t.e. ne nur verkas, sed ankaŭ tuj klarigas. Kvankam klariga frazo same misefikas al metaforo kiel al ŝerco: per troa konkretigo ĝi ĝuste forprenas la ĝuon de enigmosolvado. Malgraŭ teoria alvoko en la antaŭparolo, en la praktiko

Johansson lasas preskaŭ neniun spacon al la kreivo de la leganto.

Laŭ idea originaleco kaj literatura kvalito elstaras la framo de la rakontaro. La kontrasto de naska akvo kaj morta fajro povus konduki al pli altaj dimensioj; bedaŭrinde tiuj poeziaj pintoj montriĝos ne plu atingeblaj dum la cetero de la kolekto.

Sed la sola vere ĝena makulo sur la vizaĝo de tiu ĉi volumo estas la kovrilo: abomena kaj enhave, kaj preskvalite, kaj aranĝe, kaj kolore. Estas tute ne kompreneble, kiel povis elektigi tiu aĉa bildo, kiu neniel respegulas la enhavon de la libro. Por protekti ĉi-lastan de ties malvarba efiko, oni emus almeti ŝildon kun mesaĝo al la aĉetunto: *Atentu! Ne lasu vin trompi de la kovrilo! Mi estas multe pli valora, ol tiu ĉi sugestas.*


Lasiko Golden

Du poemaroj el Kroatio

La Bluoj. Elektitaj poemoj. Modrine, Izabrame pjesme. Vesna Parun (1922). Dulingva: kroata-Esperanta. Trad. Lucija Borčić. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1999. 141p. ISBN 953 96010 9 6. 20cm. € 10,80.

La Bluoj estas dulingva (kroata-Esperanta) poemlibro de Vesna Parun, tradukita de ŝia samaĝulino Lucija Borčić. El la antaŭparolo kaj bibliografio oni povas vidi, ke temas pri vere elstara figuro de la kroata poezio. Ni legas observojn pri naturo, melankoliajn meditojn, kontraŭmilitajn versojn (ne klaras kaj ne gravas, ĉu verkitaĵen en 40-aj aŭ en 90-aj jaroj). La poemoj estas diversaj – rimitaj kaj (ĉefe) senrimaj; la ritmo tre varias kaj iam malfacile kapteblas. En *Voko* komplika ritmo bone transdonas penan remadon. Bedaŭrinde, la purajn rimojn de la originalo en la traduko ofte anstataŭas asonancoj, agordoj ks. – “strandoj-ondoj”, “brulas-fluas”, ĝis diskone kondamnita “idon-vidas” kaj tute neakceptebla “turnas-sturĝon”. Plurloke rimoj simple perdiĝas.

Kvankam la kroata lingvo ne tre similas la rusan, multaj radikoj estas komunaj kaj komparo de la traduko kaj originaloj ofte helpis pli bone kompreni, ankaŭ pritaksi la adekvatecon. Ĝenerale la tradukoj estas fidelaj enhave, kvankam kelkloke implikiĝas: ne sciante la originalon, ne eblas kompreni la sencon de “Mi estis knabo” (reale – “infano”, ja temas pri knabino); iam eĉ scio de la originalo ne helpas (“Plaĉo”). *Balado pri l' trompitaĵoj* estas tradukita laŭvorte, kun perdo de poezieco. Ie-tie pro rimbezono aperas



fuŝoj: “kiam la neĝo la animon batos” (reale: kiam neĝo sur la animon falos); plurloke fuŝoj riveleĝas el komparo kun la originalo kaj/aŭ ioma pripreno: “dormkanto” (lulkanto), “kisas linde” (milde), “spuras” (atentas), “fordrivita neĝo” (degelinta), “prirevas” (songas) k. a. Tamen ne eblas ne atenti vere brilajn vortojn kiel “ebrige traangias la vivkonjekto”.

Estas interese kompari tradukojn far L. Borčić kun ŝiaj originalaj versaĵoj en la kolekto *Pulsas la viv*. Multo estas komuna: beleco de naturo, rememoroj pri infaneco, tristaj meditoj de “tria aĝo”; skizoj pri maro, kvieti kaj ŝtorma; pri simplaj homoj – kampuloj kaj fiŝistoj. Ne ĉio estas egalnivela: ĉeestas priskriboj de bagatelaj, iam eĉ ne eblas kompreni, kion celis la aŭtorino. Ie-tie agacas vanteco kaj banaleco (“Surterase en totalizolo”), edifa tono (“Superlativoj”, “En la sama korpo”), sed jen admirindaj “En nia golfo”, “Artist’ blua”, “Poezio”. Kaj apud plumpa “Post la incendio” troveblas brilega “Mi kongresis en Skotlando”. Min ravis interesaj esprimoj: “Ĉu nur trastrati sen okuli la povron?”, “pasinteroj”...

Zorga selekto de poemoj povus fari ambaŭ librojn pli bonaj. La teknika eldona laboro estas preskaŭ senripoĉa, preseraĵoj malmultas kaj ne okulfrapas.


Valentin Melnikov

Por informiĝi kaj amuzi viajn klubanojn aŭ lernantojn

Gloso-Blago. Ludo per lingvo. Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 288 kartoj kun 1 440 vortoj. Amuza lingva ludo, en kiu oni elpensas klarigojn kaj divenas signifojn. € 12,60.

Por instruistoj aŭ por organizantoj de klubaj aktivoj, jen valora aldonajo al via kolekto. Vortludo plej taŭga por 4 – 7 ludantoj je lingvounivelo progresinta. La instrukcio estas facile kompreneblaj kaj ĝia celo estas super ĉio amuzi, kvankam paroliĝi kaj pligrandigi la vortprovizon oficialan de la ludantoj, kun atentigo pri la neoficialaj vortoj, povas esti bona kromefiko.

La kompleto konsistas el klariga folio, 288 glos-kartoj surhavantaj unuflanke 440 vortojn kaj dorsoflanke signifvortojn elektitajn el PIV 1981–690, *Suplemento de PIV*



1987–22, de André Cherpillod: ne-PIV-aj vortoj 1988 – 560 kaj de la aŭtoro de la ludo – 62 plus 106 “gloso-blagoj” elpensitaj de la sama aŭtoro. Kiel ĵetkubo troviĝas sesangula turbo kun numeroj sur si kaj por la ludantoj slipoj por surskribi.

Jen, ludprete elektitas *glosisto* kiu rotaciigas la turbon/ĵetkubon kaj donas vorton el la listo, kies signifon la ludantoj devas diveni kaj skribi sur sian slipon. Skribinte sur la slipon unue la donitan vorton, la ludantoj silente elpensas la signifon aŭ difinon de ofte nekonata vorto por skribi ĝin apude.

Kredante ke la vorto ne havas signifon ludanto rajtas skribi *glosoblogo*. Intertempe la glosisto legas silente la ĝustan signifon kaj skribas ĝin sur sian slipon. La glosisto kolektas la slipojn, legas la respondojn kaj donas poenton al tiu kiu skribis la ĝustan signifon. Daŭrigante per divenado, la glosisto laŭtlegas la proponitajn difinojn kaj la ĝustan signifon. Se iu skribis *glosoblogo*, la glosisto laŭtlegas ankaŭ tiun vorton. Nun ĉiu ludanto, krom la glosisto, deklaras kiu el la difinoj, laŭ lia diveno, estas la ĝusta. La glosisto notas ĉiun divenon sur la konceman slipon. Fine la glosisto malkaŝas la ĝustan signifon kaj kalkulas poentojn laŭ kvin kriterioj. Poste oni redistribuas la slipojn kaj daŭrigas.

Unu raŭndo povas daŭri duonan horon, sed tempo ne gravas. Plej grave estas ke ĉiu ludanto funkciigis la cerbon, parolis kaj plejverŝajne komencis diskutadon pri la ĝusta signifo. Ĉi tiu ekzercado en si mem atentigas la ludantojn pri la konsisto kaj praveco de Esperanto-vortradikoj. Ĉu vi jam scias kiel nomiĝas *la stato de ino, kiam fekundigo eblas*? Ĉu la respondo vere estas unu el ĉi tiuj – *ango, oestro, labaro, predelo, kariko*? Por informiĝi kaj amuzi viajn klubanojn/lernantojn nepre aĉetu la ludon. La aŭtoro, Sten Johansson, volonte akceptos viajn komentojn kaj kritikojn kaj povas proponi pluajn ludojn el la sama eldonejo.

Jennifer Bishop

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiĝoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Cetercetere. Jarlo Martelmonto. Stockholm: La aŭtoro, 2002. 63p. ISBN 91 7910 409 6. 20cm. Kun KD. Avangardaj poemoj. € 15,90

Documente esperanto, vol. 6. G. Moya Escayola, G. Kersaudy. Red. kaj trad. I. Onet, S. Vlad. Rotterdam: Bero, 2002. 28p. ISBN 1 882251 40 7. 21cm. Rumanlingva. Du eseoj pri Esperanto kaj esperantismo. € 2,40

Ekprezentado de Esperanto. Kalkato: FEB, 1988. 260p. 21cm. Enkonduko en Esperanton por bengallingvanoj; kun vortareto kaj ekzercoj post ĉiu leciono. € 12,00

El mia buduaro. El Urbanová. Chapeco: Fono, 2001. 71p. 21cm. Originala poemaro dividita en du ciklojn: *Virkato kaj Demand-oj rekte sur la korpon*. € 6,90

Esperanto: A Language for the Global Village. Sylvan Zajt. Calgary: Esperanto Antaŭen, 2002. 157p. ISBN 0 7795 0031 8. 21cm. Anglalingva. Informabunda kaj ekzemploriĉa prezento de Esperanto por anglalingvanoj. € 13,50

Gramática completa do Esperanto. Geraldo Mattos. Chapeco: Fono, 2002 (2-a eld.). 189p. 21cm. Ampleksa prezento taŭga por memlernantoj. € 10,80

Manĝoj el sanigaj plantoj. Zlata Nanić. El la kroata trad. Vladimir Dujnić. Zagreb: La aŭtoro, 2002. 75p. ISBN 953 97664 5 1. 21cm. € 9,90

Mia vojo / Mi recorrido / My journey. Leda Violeta Coronado C. En Esperanton trad. Guido Hernández M. En la anglan trad. Carolina Mata. Cartago: Editorial Tecnológica de Costa Rica, 2002. 20p. ISBN 9977 66 130 8. 28cm. Kolorigebla libro pri la vojaĝo de akvoguto. € 5,10

Sentinelle, La: 1951 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 220+10+57p. 28cm. Francilingva. 94 gazet-artikoloj, diplomataj, politikaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Sentinelle, La: 1952 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 233+10+58p. 28cm. Francilingva. 95 gazet-artikoloj, politikaj, sociaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Universalismo, La. Historio, ekonomio kaj filozofio. Djémil Kessous. El la franca trad. Jacqueline Lépeix. Paris: SAT, 2002. 155p. ISBN 2 9502432 6 6. 20cm. Priskribo kaj enkonduko en novan movadon. € 11,40

Sentinelle, La: 1950 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 238+10+57p. 28cm. Francilingva. 98 gazet-artikoloj, diplomataj, politikaj, sociaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Sentinelle, La: 1953 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 229+10+57p. 28cm. Francilingva. 94 gazet-artikoloj, politikaj, sociaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Sentinelle, La: 1955 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 220+10+54p. 28cm. Francilingva. 95 gazet-artikoloj, historiaj, politikaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Sentinelle, La: 1956 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 191+10+47p. 28cm. Francilingva. 80 gazet-artikoloj, historiaj, politikaj; kelkaj pri Esperanto. € 33,00

Sentinelle, La: 1953 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 229+10+57p. 28cm. Francilingva. 94 gazet-artikoloj, politikaj, sociaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Sentinelle, La: 1954 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 227+10+56p. 28cm. Francilingva. 93 gazet-artikoloj, diplomataj, his-

Sentinelle, La: 1955 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 220+10+54p. 28cm. Francilingva. 95 gazet-artikoloj, historiaj, politikaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

toriaj, politikaj, sociaj. € 36,00

Sentinelle, La: 1955 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 220+10+54p. 28cm. Francilingva. 95 gazet-artikoloj, historiaj, politikaj; kelkaj pri Esperanto. € 36,00

Sentinelle, La: 1956 1-5. Verkaro de E. Privat: Kolekto Artikoloj. E. Privat. Red. T. Chmielik, C. Gacond. La Chaux-de-Fonds/Svidniko: Arhivaro Edmond Privat/Libro-Mondo, 1993. 191+10+47p. 28cm. Francilingva. 80 gazet-artikoloj, historiaj, politikaj; kelkaj pri Esperanto. € 33,00




Vortaro de forsta fako IV. Lexicon silvestre, Quarta pars. Red. Karl-Hermann Simon. Eberswalde, 2000. 103p. ISBN 3 931262 46 4. 30cm. € 27,00

VIDBENDOJ, KOMPAKTDISKOJ, DIVERSAĴOJ

Gutoj de Esperanto / Gotas de Esperanto. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Lar Fabiano de Cristo, 2002. 6 unuhoraj vidbendoj kun po 10 E-lecionetoj. Multaj dialogoj kaj ekzemploj; ĉiuj tekstoj legeblas surekrane. Kvan-kam celanta portugallingvanojn, la kurso uz-eblas internacie. € 81,00

Poŝtkarto flago Esperanta. Berkeley: Bero. 10x15cm. € 3,00/10 ekz.

Simbiozo. Flavio Fonseca (muziko), Geraldo Mattos (tekstoj). Brasília: BEL, 2002. 35 min. KD. Dek du originalaj poemoj en bunta muzika prilaboro. € 12,60



Forumo

Afrika Agado en danĝero

Antaŭ nelonge mi legis pri kongreso de tanzaniaj esperantistoj. Dum jam pli ol unu jaro grupeto de la urbo Pangani, apud Hinda Oceano, preparas dutagan kongreson.

Sed, kiel la esperantistoj en tiu vasta lando, pagos sian vojaĝon? Ili devas veturi centojn da kilometroj per aŭtobusoj. Ili ne povas dormi en hoteloj. Por ĉeesti esperantistan kongreson ili devus elspezi salajron de kelkaj monatoj.

Fondaĵo Afriko de UEA ne povas helpi. Mi volus helpi, sed mi sola ne povas solvi tiun problemegon. Mi esprimas mian bedaŭron, eĉ ĉagrenon, sed mia mesaĝo neniel alportos solvon al la ĉiam pli kaj pli akre sentebila problemo de monmanko.

Ĉu ni povas tiel daŭrigi? Eĉ se oni sukcesus akiri helpon por la tanzania kongreso, morgaŭ prezentiĝos alia problemo. Kaj denove nia helpo povos konsisti nur el vortoj.

Gblego Koffi skribas al unu el la organizantoj, Costantine Mashauri, Tanzanio:

La afrika oficejo havas neniun financon bazon. Ĝi dependas de la fondaĵo Afriko, kiun administras la estraro

de UEA pere de ties estrarano pri financoj. Nun la fondaĵo havas deficiton de pli ol 16 000 eŭroj.

Kion ni povas fari, tio estas disanonci pri la kongreso. Certe homoj povos sendi kontribuetojn al la kongreso. Bonvolu pretiligi anoncon, kiun vi disponigu al mi. Kuraĝon!


gk

Ĉu ne eblas iumaniere pli laŭte helpkrii, komprenigi ke jardekoj da laboro de afrikanoj kaj ne-afrikanoj perdiĝos? Kion opinias la estraranoj de UEA? Pri la deficito de la fondaĵo mi aŭdis antaŭ iom da tempo kaj kvankam la fonto estis tute fidinda, mi ne volis vere kredi. Kial oni ne pli frue bremsis por ne atingi tiun grandegan deficiton? Ĝi ne subite ekestis en la daŭro de unu monato.

Ĉu ni povas kontraŭbatali la ekonomian maljustecon, la ofte malfavorajn politikajn cirkonstancojn kiuj malebligas esperi pri iama memstareco de afrika Esperantujo? Tamen, tion atingi estas la nura espero.

Miaj vortoj nenion diros kion vi ne jam mem scias.

Agnes Geelen



Mwenge Hassan el Tanzanio instruas Esperanton al infanoj





Loke

★ **PEKINO:** La 26-an de septembro 2002 kvindeko da pekinaj esperantistoj kunvenis por aŭskulti raportojn pri la 87-a Universala Kongreso de Esperanto en Fortalezo kaj la 3-a Azia Kongreso de Esperanto en Seŭlo, fare de s-ino Tan Xiuzhu, prezidanto de ĈEL, kaj s-ro Yu Tao, ĝia ĝenerala sekretario. S-ro Wang Hanning, asista ĝenerala sekretario kaj direktoro de la oficejo de ĈEL, konigis al la aŭskultantoj la laborojn de ĈEL pri la preparoj de la 89-a UK en Pekino.

★ **RUSIO:** Reta gazeto *Novosti Esperanto-dvijenija* (Novaĵoj de E-movado), aperanta ekde 1999 en *Subscribe.ru* (redaktata de Slavik Ivanov) lastatempe akiris du pliajn disvastigajn kanalojn: en *Content.mail.ru* kaj en *Maillist.ru*. Tio aldonas al ĝiaj nunaj 1600 abonantoj milojn da novaj. Por kompari – la reta kurso de Andrej Grigorjevskij, kiu aperas en *Subscribe.ru* (ekde sept. 2001) havas ĉ. 1400 abonantojn, ĝia klonon en *Content.mail.ru* (ekde sept. 2002) ĉ. 1200, en *Maillist.ru* (2001) ĉ. 3400. Entute pli ol 6000 E-kursanoj! Tre verŝajne monda rekordo.

★ **NEDERLANDO:** Inter la 1-a kaj la 3-a de novembro en la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, okazis A-seminario por eduko de Cseh-metodaj instruistoj. Partoprenis 12 personoj el Belgio, Germanio kaj Nederlando. La partoprenantoj ricevis fundamentajn teoriajn sciojn pri la rektmetoda instruado: pri la historio de la metodo, biografio de Andreo Cseh kaj IEL; pri la bazaj principoj, fundamentaj reguloj kaj karakterizaj ecoj de la metodo.

★ **DAGESTANO:** Ekde septembro 2002 en la Kaŭkazia Laika Instituto en Mahaĉkala

(Respubliko Dagestano, Rusio) oficiale funkcias Katedro de Internacia Lingvo Esperanto. Studentoj de la fakultatoj dizajna, religioscia, komputila k. a. studas E-on. Bonvenas kuraĝigaj leteroj ĉe la estro: Abdurahman Junusov, Ab/k 74, RU-367000 Mahaĉkala, Respubliko Dagestan, Rusio. Tel.: +7-8722-630643 Fakso: +7-8722-630643. Rete: junusov@dagestan.ru; junusov@labranet.ru.

★ **BRAZILIO:** Dimanĉe la 1-an de decembro, pere de la TV-stacio de la Brazila Parlamento, okazis elsendo de unuhora

programo pri Esperanto, sub la aŭspicio de neregistara organizaĵo *Planeda Unuiĝo*, kies celo estas la etna diverseco. Oni trafis informis pri niaj lingvo kaj movado: okazis intervjuoj kun la prezidanto de Brazila E-ista Junulara Organizo Cassius Desconsi kaj Josias Barbosa, eksa vicprezidanto de BEL, estis prezentitaj scenoj de la TEJO-Kongreso en Pato Branco kaj la UK en Fortalezo, montrita E-leciono fare de Sylla Chaves, intervjuita Fabricio Valle. Oni abunde informis pri diversaj aplikoj de E-o en muziko, teatro, prelegoj, ktp. Estis prezentita Flavio Fonseca kaj Banda Merlin, ne mankis citaĵo pri Bona Espero kaj intervjuo kun Ursula Grattapaglia kun prezento de la infanoj de tiu bieno-lernejo, eĉ specimeno de la filmo *Mazi* en Gondolando. Do bela kaj ĝusta prezento de Esperanto kaj nia movado, per kablaj TV-stacio, kiu estas spektata tra la tuta Brazilo.

Fake



★ **TROVANTO** estas finita! En ĝi troviĝas la tuta havaĵo de IEM en Vieno, en jenaj kategorioj: libroj, broŝuroj, "griza literaturo", manuskriptoj, gvidiloj, muziknotoj, aŭdkasedoj, vidbendoj ... *Trovanto* fariĝis kun siaj 29 000 rikordoj la plej granda datenbanko pri Esperanto kaj interlingvistiko.

★ **MONDA ENKETO:** La grupo *Language Advantage* provas instigi la britojn pli interesiĝi pri lingvolernado, kaj tiucele starigis diversajn agadojn, inkluzive de ĉiujara monda enketo pri lingvoj ĉe la laborejo. Britaj esperantistoj starigis kontaktojn kun ili, kaj ili interesiĝas pri Esperanto. Tio signifas, ke ni trovis aldonan organizaĵon kiu interesiĝas pri popularigo de Esperanto. La anoncita monda enketo (bedaŭrinde nur en la

angla) troveblas ĉe <http://www.languageadvantage.com/surveys/worksurvey02.htm>. Amasa partopreno povus multe helpi.

★ **RET KONFLUOJ:** Eblas konsulti E-version de la retgazeto *Retkonfluo*, organo de Tutmonda Federacio de Uneskaj Asocioj, Centroj kaj Kluboĵ ĉe <http://fr.groups.yahoo.com/group/Retkonfluo>.

★ **ĈINA RETKURSO:** Interrete jam funkcias versio en la ĉina lingvo de la *Kurso de Esperanto* de d-ro Marcelo Casartelli. La tradukon faris Li Zhongmin el Hangzhou, provinco Zhejiang, Ĉinio. La kurso konsistas el 15 lecionoj. La retadreso estas: <http://www.hzmj.org/e-kurso/index.htm>, la aliaj versioj (en la hispana, angla, germana, franca kaj itala): www.institutoesperanto.com.ar.

★ **JAPANIO-KROATIO:** Ŝia Imperiestra Moŝto Princino Sayako vizitis Kroaton. Okaze de la restado ŝi vizitis operon. Aldone koncertis por ŝi kaj ŝia akompanantaro la 16-an de oktobro 2002 fama kroata pianisto Ivo Pogoreliĉ. Post la koncerto ŝi renkontiĝis kun kvardeko da homoj el la kultura kaj scienca vivo kaj informiĝis pri diversaj aspektoj de la kunlaboro kun Japanio. Spomenka Ŝtimec, unu el la gastoj ĉe la koncerto, havis la okazon informi la principon pri Esperanto, per kiu ŝi kunlaboras kun Japanio. Al gardamo de la principo estis enmanigita la traduko de la novelo *La lasta batalo de la moretto*, verkita por IJK en Rijeka kaj tradukita en la japanan de Mori Singo.



FARIĜU KONSICIA SUBTENANTO DE TEJO!
fariĝu **patrono de TEJO**
Pagante 3 eldono de vizitanto TEJO, vi akiras vi nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi akiras novajn:
- Kongresoj;
- TEJO Ardeno (oficiala organo de TEJO);
- eldonojn dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn socikulturajn servojn kaj publikadojn.

Multaj arde deziras membri en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al **Fondajo Canuto** helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Forumo

La 115-a ĉtenero

Nia karmemora korifeo Gaston Waringhien omaĝis al la jubilea numero de la revuo *Esperanto* en julio '87 per la artikolo *Kaj tamen ni ĝin atingis*. Kaj de tiam jam pasis 15 pliaj jaroj, de flusoj kaj malflusoj, de ĝojoj kaj ĉagrenoj. Kio plej gravas, laŭ mia modesta opinio, estas ke, por ni, parolantoj de Esperanto, la lingvo, la movadoj, niaj kulturoj libra, ĵurnalista, muzika kaj sendube la kongresoj, fariĝis tiel memkomprenebla rutino, ke ni ne plu devas zorgi pri nia bazo kaj povas liberigi la laboremajn fortojn por okupiĝi pri la nuno kaj la estonto. Tio jam estas iaspeca venketo, kiu ebligas al ni direkti la fortojn al utila laboro, laŭ la vojo

RET-INFO

<http://www.eventoj.hu>

Retpoŝta Esperanta-novaĵservo

ret-info@esperanto.org

Oficiala informilo



SOCIETO ZAMENHOF 2002

Litovio: Paul K. Jegorovas.

PATRONOJ DE TEJO 2003

Argentino: Atilio Orellana Rojas. **Aŭstralio:** Jennifer R. Bishop. **Belgio:** Grégoire Maertens. **Finnlando:** Synnöve Mynttinen. **Germanio:** August Franke; Nora Caragea. **Nederlando:** Pieter M. Portegies; W.L. van Leeuwen.

SOCIETO ZAMENHOF 2003

Aŭstralio: Stan J. Bruton. **Belgio:** Elfriede Ernst; Grégoire Maertens. **Britio:** d-ro John C. Wells. **Finnlando:** Synnöve Mynttinen. **Franco:** André Albault; Raymond Boré. **Germanio:** August Franke; Harry Bily; Claude Trésorier. **Japanio:** Wilhelm Schmid. **Nederlando:** G.A.M. van Bergeijk; Sija van Wijngaarden. **Norvegio:** Kjell Peder Hoff; Tomas Jansson. **Slovenio:** Jožica Zidanik. **Usono:** Prof. d-ro Humphrey Tonkin; Jane Edwards.

DONACIOJ 2002 (EUR)

ĝis la 30-a de novembro

Kapitalo Afriko: **Finnlando:** R. Pyhälä 200,00. **Franco:** N. Tadeul 500,00. **Nederlando:** F.D. van Zoest 11,50. **Slovenio:** J. Zidanik 400,00. **Sumo ĉi-jara:** 11 035,91.

Fondajo Afriko: **Franco:** A. Cnudde 25,00; D. & A. Loisel 96,64. **Japanio:** H. Matuda 98,52. **Nederlando:** Fam. J.K. Hammer 50,00. **Sumo ĉi-jara:** 4 191,31.

Fondajo Ameriko: **Finnlando:** T. Sormunen 50,00. **Venezuelo:** J. Bachrich 60,00. **Sumo ĉi-jara:** 4 027,99.

Fondajo Azio: **Japanio:** A. Aoyama 20,53; K.

Gotou 16,42; H. Harada 16,42; T. Huzita 24,63; H. Ie 82,10; M. Isino 32,84; K. Kakehi 24,63; K. Kobayasi 24,63; H. Maekawa 24,63; S. Mitukawa 41,05; T. Saitou 16,42; K. Sanpei 16,42; T. Suzuki 16,42. **Sumo ĉi-jara:** 3873,60.

Fondajo Canuto: **Britio:** L. Mee 50,00. **Nederlando:** A.E. Moerbeek-Prins 50,00; D. van Zanten 30,00. **Sumo ĉi-jara:** 1666,20.

Junulara Fondajo: **Aŭstralio:** E. Claus 5,00; J. Perkins 5,00. **Franco:** J.-L. Kristos 20,00; D. & A. Loisel 96,64; N. Tadeul 500,00. **Sumo ĉi-jara:** 2013,36.

Konto Espero (Lingvo de Paco): **Belgio:** Deurne (lernejo J. Verstraeten) 70,00. **Egiptio:** R. Lecat 100,00. **Korea Respubliko:** Pusanaj esperantistoj 96,35. **Sumo ĉi-jara:** 6685,84.

Konto Etiopio: **Aŭstralio:** J. Bishop 50,00. **Belgio:** D. Van Herpe 50,00. **Germanio:** B. Westerhoff 100,00. **Hispanio:** L. Hernández 50,00. **R. Urueña de Hernández** 50,00. **Italio:** S. Garnero 25,00; M. Lipari 50,00. **Nederlando:** J.H. Derks 70,00; T. Steele 100,00. **Sumo ĉi-jara:** 455,00.

Konto Eŭropo: **Franco:** A. Cnudde 25,00; D. & A. Loisel 96,63; N. Tadeul 500,00. **Slovenio:** J. Zidanik 300,00. **Sumo ĉi-jara:** 9389,60.

Volontula Fondajo: **Norvegio:** E. Matland 13,68. **Sumo ĉi-jara:** 188,38.

Fondajo Ŭister: **Venezuelo:** J. Bachrich 30,00. **Sumo ĉi-jara:** 30,00.

Ĝenerala Kaso: **Germanio:** A. Nonima 20,00. **Nov-Zelando:** W.J. Wyber 7,43. **Sumo ĉi-jara:** 1854,35.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

montrita de Zamenhof kaj la pioniroj. La mondo ankoraŭ bagateligas kaj ignoras nin, sed ni rilatu al tio kiel elefanto al kulopiko.

Do estu la 115-a unu ĉtenero en la rutina sinsekvo de jaroj, kiuj konduku nin al realigo de pli bona kaj justa mondo ankaŭ sur la lingva kampo. Ni havas la plenan rajton festi kaj daŭrigi. Ĝis baldaŭna renkontiĝo en Esperantujo.

Korajn salutojn de David Shamgar

Esperanto per lomi pli ol 500 vortoj!

Tiu ĉi internacia, leg-metoda lernolibro uzeblas kiel memstara (pro multegaj klarig-bildetoj), tiel ankaŭ por organizita aŭ post-leciona lernado.

Recenzo de Boris Kolker:
"Mi vidis nur la unuan libron. Ĝi impresas plaĉe. Malforta eble legi lon, konante nur ducenton da vortoj."

Volumo 1: 209 vortoj, 225 paĝoj, 8,10 eŭroj
Volumo 2: 100 vortoj, 205 paĝoj, 8,10 eŭroj
Volumo 3: 192 vortoj, 260 paĝoj, 10,20 eŭroj
Adreso por mendi: POK 22041, IL-61220 Tel-Avivo, Israelo. (Konto ĉe UEA: ELIA-Q)



Persone

★ **Jukka Pietiläinen** defendis sian doktoran disertacion *La regiona gazeto en la postsovetia Ruslando* en la Universitato de Tampere, la 5-an de oktobro. La studo esploras ŝanĝojn en la rusa gazetaro dum la politikaj reformoj fine de la 1980-aj jaroj kaj post la kolapso de la sovetia sistemo. Ankaŭ Esperantaj kontaktoj helpis al la aŭtoro profundigi en la Ruslandan kulturon. La disertacio havas Esperantan

resumon. Pietiläinen estis i.a. prezidanto de E-Asocio de Finnlando (1994-98) kaj LKK-ano de la Tampere UK (1995). Li estas fakdelegito de UEA pri ĵurnalismo. (Legu pli en <http://www.uta.fi/-tijupie>). La disertacio havas la titolon *The Regional Newspaper in Post-Soviet Russia: Society, Press and Journalism in the Republic of Karelia 1985-2001*, 532 p., ISBN 951-44-5454-5, eld. Tampere University Press.



La Kataluna sur Majorko

La 31-a Kataluna kaj la 4-a Transpirenea Kongreso de Esperanto okazis komence de novembro en la marborda urbo Solter sur la insulo Majorko, 75 jarojn post la tie okazinta 14-a Kataluna Kongreso en la jaro 1927.



La publiko en la teatro

Aliĝis 64 gekongresanoj, krom katalunoj ankaŭ homoj el Portugalio, Hispanio, Britio, Italio, Kroatio, Francio, Svedio kaj Germanio. Prelegis gastoj Paul Gubbins kaj Viŝnja Branković, kaj kantis Gianfranco Molle. Kromaj prelegoj okazis fare de la KEA-prezidanto Josep Franquesa pri *Malgrandaj entreprenoj* kaj Hector Alos pri *Lernado de fremdaj lingvoj: kiucele?* Koncertis la kataluna teamo Kaj Tiel Plu kaj premiere prezentigis la teatraĵo *La Balkaniko* de Albert Herranz. Elstaris omaĝo al la lokaj pioniroj fratoj Miquel kaj Andreu Arbona kun prezento de la verko de Xavier Margais pri la movado en Majorko, kiun la aŭtoro mem skizis.

Libert Puig

Interlingvistiko populariĝas

Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando) atingis gravan momenton fine de septembro: la unuaj studentoj finis siajn studojn kaj sukcese defendis sian diplomlaboraĵon.

Enĉe Efreanova el Makedonio prezentis la rolon de rido en la poemoj de Baghy, Andreas Emmerich, prezidanto de Germana E-Asocio analizis la tradukon de *La Mastro de la Ringoj* de Tolkien kaj Peter Zilvar, same el Germanio, komparis la vortprovizon de kelkaj bazaj vortaroj Esperantaj kaj etnolingvaj.

Dum la sama semajno (23-27.09) 23 novaj studentoj komencis siajn studojn. La interlingvistikaj studoj allogis studentojn el Pollando, Germanio,

Litovio, Rusio, Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Svedio kaj eĉ el Irano. Ses el inter ili povis partopreni dank' al la stipendioj de *Esperantic Studies Foundation* kaj unu dank'al la stipendio donacita far Mila van der Horst-Kolir'ska.

La internacia studentaro ĝuis la prelegojn de internacia profesoraro. Kun prof. Wells (Britio) ili malkovris la sekretojn de sonoj. Prof. Geraldo Mattos (Brazilo, prezidanto de la Akademio de Esperanto) prezentis al ili originalan aliron al literaturo surbaze de la unua periodo, kun la kontribuo de la poetino Lidia Ligéza kaj Tomasz Chmielik.

D-ro Zbigniew Galor (el la surloka stabo) enkondukis la aŭskultantojn en la multkoloran E-kulturon kun la kontribuo de Zofia Banet-Fornalowa pri E-teatro kaj de Judit Schiller pri E-filmarto.

La partoprenantoj ekkonis kaj mem komparis la diversajn formojn de lingva



kaj nelingva komunikado en interkultura kunteksto laŭ la instigo de d-rino Ilona Koutny, gvidanto de la Studoj.

La interkomunikado daŭris vespere kaj semajnfine, kiam okazis la tradicia kultura renkontiĝo Arkones en Poznań.

La kulturajn konojn kompletigis interalie la impresa spektaklo de Jerzy Fornal (Aniara) okaze de la 20-jara jubileo de lia unupersona E-teatro kaj muzika koncerto de Leszek Dobrowolski, Oĉjo Dadaev, Zuzanna Kornicka kaj de Mikaelo Bronŝtejn kun mielvino.

Multaj aliaj prelegoj (pri Varankin, Dostojevskij, Eŭropa identeco, alfabetoj de Eŭropo, tradukarto, E-vortaroj en la reto, ktp) kaj diskutoj amuzis la homojn. La kunordigo de la du aranĝoj pruviĝis ankaŭ ĉi-foje fruktodona.

Ilona Koutny

La Benina ĉefurbo de Esperanto

De la 5-a ĝis la 7-a de julio 2002 la urbo Lokossa, la ekonomia ĉefurbo de Benino, fariĝis nia benina ĉefurbo: okazis tie la Unua Benina Esperanto-Kongreso, en bela urba parko nomata Cese Pilote.

La unua BEK kunvenigis centon da enlandaj verdstelanoj kaj esperantistoj el la najbaraj landoj: Togolando, Niĝerio kaj Senegalio. Dum la kongreso okazis la unua parto de la ekzameno A de TIETO-Instituto de Esperanto en Togolando, kaj diskut-rondo pri la temo *Kial mi lernas Esperanton?*

La malferman inaŭguron ĉeestis ankaŭ la urbestro kaj la reĝo de Lokossa. La kongresa temo estis: Ĉu

Esperanto havas ŝancon en Benino? La ĉeestantaro venis al la konkludo, ke Esperanto havas ŝancon en Benino, pro la aktiveco kaj entuziasmo de la Beninaj esperantistoj, sed necesas fortigi tiun ŝancon. La kongreso akceptis rezolucion, kiu rekomendas, ke Benina E-Federacio organizu kaj kunordigu la agadojn de E-klubo kaj ke ĝi plifortigu siajn rilatojn kun la afrika oficejo, UEA kaj aliaj landaj asocioj.

Gbeglo Koffi



Partoprenantoj de la Unua Benina Esperanto-Kongreso en Lokossa.

Rendevuo de praktikantoj

Preskaŭ 50 personoj partoprenis en GRUPE-6, Glivica Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto (08-11 nov. 2002).

La aranĝon organizis Pola Esperanto-Asocio, filio en Gliwice. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ gastoj el Hispanio kaj Slovakio. El la programo oni povas mencii prezentadon de la krakova koruso Kamea kaj poezian programon fare de la infanoj de la Esperanto-klubo de Staszów. Kiel kutime Andrzej Sochacki prezentis sian

foto-ekspozicion. Interese prelegis Bradio Moro, Kazimierz Leja kaj Augusto Casquero, diskutrondon gvidis Aleksander Zdechlik. La estraro de PEA havis la okazon prezenti siajn novaĵojn. Dimanĉe okazis kortuŝa Sankta Meso en Esperanto, kiun gvidis la pastro Jozef Zielonka.

Andrzej Sochacki



En la kapelo de la preĝejo Sankta Kruco post la Sankta Meso



Rusa E-librejo

Dum multaj jaroj en la antikva rusa urbeto Tiĥvin, 200 km de Sankt-Peterburgo, funkcias Esperanto-fako ĉe urba librobutiko.

La posedanto de la butikoj, konata Esperantisto kaj maratonisto Aleksandr Belov, ne plendas pro manko de aĉetantoj. Bone vendataj estas lernolibroj, vortaroj kaj legolibroj por komencantoj, inter kiuj la plej populara estas *Mamutido Miĉjo* de Mikaelo Bronŝtejn. Tamen la kelkdekpersona komunumo vige interesiĝas ankaŭ pri novaj eldonaĵoj.

Ne maloftas en la butikoj eksterlandaj gastoj-esperantistoj, kiuj speciale atentigas la rusajn E-librojn. Unu el la vizitantoj lastatempe estis Ilja De Koster, la kasisto de TEJO. Bedaŭrinde li venis sen la kaso...

Viktoro Kandalinskij

Pri pli ol cent Esperanto-lerniloj vi trovas detalan prezenton kaj analizon en la KATALOGO de

www.edukado.net

edukado.net

La servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto



Vicdekanano de la filologia fakultato de UAM, Ilona Koutny kaj prof. G. Mattos

Ĝis la fino de januaro 2003 daŭras la kampanjo MEMBRO-MEMBRON!

Se ĉiu el ni akiris nur unu novan membron, UEA, do ankaŭ la legataro de la revuo, duobligus.

Multaj esperantistoj membriĝus en UEA, se iu proponus tion al ili!

La kampanjo MEMBRO-MEMBRON! estas samtempe konkurso.

Ĝi daŭros ĝis la fino de januaro 2003.

Ĉiu membro de UEA, kiu akiris novan individuan membron (en ajna kategorio), ricevos libropremion kaj lia nomo aperos en tiu ĉi rubriko.

Unu konkursanto (decidos loto) ricevos La Novan Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto. Ekzempleron de La Nova PIV ricevos ankaŭ membro, kiu akiris la plej multajn novajn membrojn.

La lotumado okazos la 10-an de februaro 2003. La rezulto aperos en la marta n-ro de la revuo.

La kondiĉoj: bonvolu rete aŭ skribe informi la redaktoron ke vi akiris novan membron: skribu vian nomon, vian UEA-kodon, la nomon kaj la adreson de la (de vi akiritaj) nova membro. Post alveno de la kotizo (eblas ankaŭ donaci ĝin!) vi eniros la konkurson.

Helpu ankaŭ vi vastigi nian komunumon!

Krucenigma konkurso:

la kaŝitan proverbon bv. sendi maksimume tri monatojn post la apero (poŝte, fakse aŭ rete) al la redakcio.

Solve el la julia-aŭgusta revuo: *Rapide akiris, rapide perdis*

La solvojn sendis: Jean-Marie Ries (Luksemburgio), M. Paul Lafont (Francio), Ronald Gates (Aŭstralio), Karin Lencki (Germanio), Jean-François Cousineau (Francio), Pieter Jan Doumen (Belgio), Adolf Burkhardt (Germanio), Angus Wilkinson (Britio), J. Pauluk (Brazilo), Julian Ducrocq (Francio), Milan Smělý (Ĉeĥio), Jay Fishman (Usono), Jackie Huberdeau (Francio), Manuel Casanoves (Hispanio), Ronald Cuenot (Francio), Tore Johansson (Svedio), František Štoviček (Ĉeĥio), José Mauro Progiante (Brazilo), André Léval (Francio), Otto Prytz (Norvegio), Alfonso Soares (Brazilo), Marc Bavant (Francio), Neal McKown (Usono), Aoyama Tooru (Japanio), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Bert Schumann (Germanio), Dieter Dungert (Germanio), Christoph Brandes (Germanio), Edmund Grimley Evans (Britio), Llibert Puig (Hispanio), Germain Pilot (Belgio), Mihailo Nešić (Jugoslavio), Celio A. S. Brandão (Brazilo), Jurij P. Kivajev (Rusio), Martin Weichert (Svedio), Apélété Agbalo (Togolando), Rune Moln (Svedio), Denise Hubert (Francio), Erkki Kempainen (Finlando), Sonja Brun (Svislando), Nancy Fontannaz (Svislando), Christian Rivière (Francio), Neil MacKilligin (Britio), Wandenberg Vieira (Brazilo), Grozdenka Filipova (Bulgario), Luiza Marin (Francio), Ismael de Miranda a Silva (Brazilo), Ness Claus (Aŭstralio), Dao Mai Anh (Vjetnamio), Malcolm Jones (Britio) kaj Sergei Paĥomov (Rusio). La libropremion gajnis: Alfonso Soares el Brazilo. – Elkoran gratulon!



ĜUSTIGO

★ En la novembra revuo, p. 228 (Kalendaro), ne aperis ĝusta dato de la 38-a Brazila Kongreso de Esperanto. La ĝusta estas de la 20-a ĝis la 24-a de julio 2003.

★ La Euroscola-tago sur la p. 110 (majo 2002) okazis ne en Bruselo, sed en Strasburgo.

La redaktoro pardonpetas.

UEA	LA UNUA KASITA PROVERBO	INFINITA PINAJO	UEA	GRUP. KOLEKTIV	DEFINITA PART DE SENCO	AMERIKA STATAK	LA DUA KASITA PROVERBO
PERSONA PRO-NOMO		SULPAT (de K=AL) BOVATO, SIFETO					
SIMBOLO DE AMPERO		PER PROT. PUBLIGILO RUSA VIBROKAT					
POSE-DATE DENI				INSEKT. SUBKAKTO SINE DE OSMO			
GIGANTO EL FARELO					PLURALA PRONOMATO DIAFANA MINERALA		
BOVA AŬ ĈEVALA MALISANO						NULO PER-CEPTAS SONOJN	
PECEJO PARTETO				ENTRE PER MONO. APTILO			
NOMO DE LA 15-A LETERO				AROMA ARE REGISTRAS BILDOJN			
SIMBOLO DE JODO				SULKIGI FLEKSIGI ROMPOS MURJOJN			
SINJORO					DEZERTA INKUL VALORA METAL		
TAGO, MONATO KAJ JARO					SOVETA ARMOO PLAF-EBLA		
MARA KANKRO						ADVERBA FINAJO ELEMENTO (E)	
ARVO GUTAR SUR HERBO					RESPONDO AL R. DETENAT. RENO (INTERU)		
NAGIA ORGA-NEZO				INTENS. KAPAB. PURA BELA			
SUBSTAN-TIVA FINAJO				MAL-BEKTA KULTATA FIGURO			
PART DE ELEKTRA BATERIO					ENUELMAKADOMO PERSONA PRONOMATO		
LA UNUA VIR					REFRANZO POST ROM PARABOLO + PINORA MEV		
HOM-SIMILA SIM						VOLUTIVA FINAJO LANDA ASOCIO	
LATINE FLUGILO					MORT KON PASTEJO LA TRIA TONO		
NOMO DE LA 24-A LETERO				EPORO, JARARO			

Aŭtoro: Stano Marček

SIMPLE LA PLEJ BONAJ!

SALUTON! ESPERANTO AŬTOIDAKTE



Audrey Childs-Mee (1926-1990). Rotterdam: UEA, 2002. Sepa eldono. 234p. 21cm. ISBN 92 9017 050 6. Prezo: € 10,80. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO



Boris Kolker (1939). Rotterdam: UEA, 2002. Dua, reviziita kaj korektita eldono. 279p. 21cm. ISBN 92 9017 078 6. Prezo: € 18,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.


NEMALHAVEBLA SERIO DE UNIKAJ BROŜUROJ

Teknikaj Kajeroj de Gilbert R. Ledon

1. MANEKOJ kaj NI. 1996. 24p. €2,70.
2. HERMETIKAJ PUMPILOJ (por mediprotetiado). 1999. 28p. €3,60.
3. ANARKIA KONSTRUO al HOMFORMA SOCIORDO. 1997. 32p. €1,50.
4. FAMILIA LINGVO: ESPERANTO. 1996. 20p. €1,50.
5. IKARO NE SONĜIS: kial aviadiloj flugas. 1999. 24p. €3,60.
6. KONSTRUU VIAN DOMON. 2002. 36p. €4,80.

La Teknikaj kajeroj provas helpi al esperantistoj uzi sian lingvon en ĉiutaga vivo, en scienco kaj tekniko. Ĉiu broŝuro estas 22x16-centimetra kaj ilustrita. La lingvaĵo estas laka, sed ne peza.

Mendu ĉe la LIBROSERVO de UEA. Sesona rabato por aĉeto de la kompleta serio.



la plej

vaste legata ĵurnala gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

Koljako estas gazeto
por ĉiu kiu sentas interesan
legadon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, teli ke
Koljako estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso alendas vin en
ĉiu numero de la revuo!



En 2003 **Koljako** aperos
6-foje. Abonu rakte de UEA
aŭ de via kolizperanto.

ABONTARIFA 2003

Armenio	19 eŭroj	Belorusio	19 eŭroj	Germanio	19 eŭroj	Medellano	19 eŭroj
Aŭstralio	19 eŭroj	Brazilo	19 eŭroj	Hispanio	19 eŭroj	Norvegio	19 eŭroj
Belgio	19 eŭroj	Britio	19 eŭroj	Irlando	19 eŭroj	Portugalo	19 eŭroj
Brazilo	19 eŭroj	Ĉinio	19 eŭroj	Italio	19 eŭroj	Svedio	19 eŭroj
Danio	19 eŭroj	Finlando	19 eŭroj	Japanio	2000 enoj	Svislando	19 eŭroj
Francio	19 eŭroj	Germanio	19 eŭroj	Koreio	27 dolaroj	Usono	19 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informigu!**

La 88-a survojas...

kaj ĝia glumarko (5,5 x 4 cm) pretas akompani
viajn feterojn
dum la sekvantaj
monatoj. 12-peca
folio kostas € 1,20.
Tria rabato ekde
tri folioj. Mendu
ĉe la Libroservo
de UEA.



ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2003?

**POR CERTIĜI, NE ANKAŬ EN 2003 VI ANURATE
RICEVOS LA REVUON ESPERANTO. NE FORGESU PAŬI
FRUE VIAN KOTIZON. KOTIZATELO APERIS EN LA
OKTOBRA NUMERO, P. 199 (AŬ PETU DE LA COL).
DANKONI!**



Escoj memore al
Ivo Lapenna

Redaktoro: Carlo Minnaja

ESEOJ MEMORE AL IVO LAPENNA

Fascina mozaiko de personaj rememoroj pri la
arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA.
Kopenhago, 2001. 417p. 25cm. Kun kompaktdisko.
Prezo: € 45,00. Tria rabato ekde 3 ekz.



RETORIKO MALPLIKOSTA

Retoriko. Science redaktita, pense riĝiga verko de
Ivo Lapenna. Roterdamo, 1971 (tria eldono). 294p.
20cm. Prezo: € 19,80 (malnova prezo: € 23,15).
Tria rabato ekde 3 ekz.